

1988 februaro
81a jaro
n-ro 986 (2)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun un kaj unesko)
sidejo: nieuwe binnenweg 176 • 3015 bj rotterdam • nederlando



Foto: Torben Kehlet

Mortis la Movada aristokrato:
prof. d-ro Ivo Lapenna (1909-1987)

Vi trovos,

unikan numeron, honore al unika homo. Ĉar pri tio ĉiu konsentas: Ivo Lapenna estis meteoro, kia nur unufoje trabilos la movadan firmamenton. Venos pliaj elstaraj apogantoj de la ideoj kaj lingvo de Zamenhof, sed neniun povos anstataŭi Lapenna kiel la fondinto de fortika tutmonda movado, kun idealoj kaj ambicioj kapablaj porti ĝin en la duan jarcenton.

Lia dektrijara distanciĝo de tiu movado, kaj aparte de UEA, ne povis ŝanceli la ligojn inter li kaj ni. Tion montris la simpla kaj intima funebra ceremonio, la 19an de decembro en dana preĝejo, kie kvindeko da homoj kaj amaso da florkronoj el pluraj landoj atestis je la memoroj de la esperantista diasporo. La Ĝenerala Direktoro de UEA legis telegramojn de la Prezidanto kaj de la nepo de L.L. Zamenhof, Ludoviko Zaleski-Zamenhof. Sed la enhavon de ĉi tiu numero plej trafe resumas la florkrona mesaĝo: "Al sia ĉefkonstruinto Ivo Lapenna, danke kaj respektoplene — UEA."

Enhavo

- 21 Ivo Lapenna donis dignon al la Internacia Lingvo
Funebra telegramo de Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA
- 22 Nekrologo: Ivo Lapenna (1909-1987) (Ulrich Lins)
- 23 Al Ivo Lapenna (1950) (Reto Rossetti)
- 24 La venko de Montevideo; Montevideo 1954 (Kalman Kalocsay)
- 27 Omaĝoj: Ludoviko Zaleski-Zamenhof, Gaston Waringhien, Marjorie Boulton, Juan Régulo Pérez, Ralph Harry, Detlev Blanke, Chen Yuan, William Auld, Ivo Borovečki, Baldur Ragnarsson, Ulla Luin, John Wells, Tibor Sekelj, Nikolaj Aleksiev, Probal Daŝgupto, Carlo Minnaja, Edwin de Kock, Ivo Osibov, Yukiko Isobe
- 31 6a CED-konferenco kaj la Premio Zamenhof 1987: Rekorda partopreno en Novjorko
- 32 Movadaj novaĵoj: Eksterordinara eldono en Irano; Planlingvoj fakule en Sovetunio (N. Laanoja); Esperanto ĉe la Vintraj Olimpikoj!; Teknika kunsido de la Estraro de UEA; Esperanto-rubriko en 12-lingva revuo; 1988 "Jaro de Grabowski"; Celade al nova filmepoko. . .; Unika ŝanco ekkoni la japanan kulturon; Semajno de Internacia Amikeco 1988; Terminologo tra Eŭropo
- 36 Reagoj: Pri la Infana Kongreseto (Carlos de Faria, Adamo Goralski Pawlikowski); Interreligia renkontiĝo en la 73a UK (Wim Koopmans); Ne tute racia rezonado? (Germain Pirlot, Bernard Aunis); Korespondaĵo koboldologia (William Auld); Ni kuraĝu herezaĵon! (Eduard V. Tvarožek)
- 37 Recenzoj: *Flugilhava ŝtono* de Jiří Karen/trad. Jiří Kořínek (Probal Daŝgupto); *La rabeno de Bacherach* de Heinrich Heine/trad. R. Hauptenthal (Martin Haase); *Baza legolibro por komencantoj* red. Vilmos Benczik (Wei Yuanshu)
- 38 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 40 Oficiala Informilo; Nekrologoj

La kovrilo

Jen ne la unua fojo, ke ĉi tiu vizaĝo dominas nian kovrilon. Inter 1955 kaj 1971, ne malpli ol 15 numeroj de *Esperanto* paradis sub standardo de Ivo Lapenna — jen en Universala Kongreso, jen en landa renkontiĝo, kvarfoje portrete sola. Venis nun la lasta okazo, kormalĝojiga. La fama ora voĉo ne aŭdeblas, sed la nobla vizaĝo kaj pensema, iom malgaja rigardo restas fidelaj atestantoj pri la spirita aristokrateco de sia portinto.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910); **establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 105 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 44,50; US\$ 21; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉisuba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperantomovado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telekso: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). **Nederlanda poŝta ĝirkonto:** 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto (planado, Jubileo): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; tel. (315) 265-6744; telekso (5) 9103500242 ud.

Vicprezidanto (gvidas eksteran agadon): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35.

Vicprezidanto (interna kaj ekstera agadoj): s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tōkyō, 153, Japanio; tel. (3) 770 64 86.

Ĝenerala Sekretario (interna agado): d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.

Estrarano (ekstera agado): d-rino Barbara Despiney, 21 rue des Cuverons, F-92220 Bagneux, Fr.; tel. (1) 46 65 22 16.

Estrarano (ekstera agado): prof. d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg házaspár u. 5, H-1054 Budapest, Hung.; tel. (1) 316 423; telekso 225931 muegy h.

Estrarano (interna agado): s-ro Diccon Masterman, "Quasi in Cima", Via di Cicina 610, I-55029 S. Stefano di Moriano (LU), Italio; tel. (583) 570 66.

Estrarano (interna agado): s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.

Ivo Lapenna donis dignon al la Internacia Lingvo

La Zamenhofa Tago 1987 devis esti tute ĝoja kaj festa. Ĝi ankaŭ estis tia en multaj kluboj kaj societoj tra la mondo. Decas tiel en la Jubilea Jaro dum kiu la Internacia Lingvo pruvis sin pli altstatura ol iam ajn antaŭe tra la centjara historio. Tamen, la sorto volis, ke la Esperanto-movado perdu ĝuste en tiu tago la plej elstaran organizan figuron, kiun ĝi iam ajn havis: frumatene mortis en Kopenhago prof. d-ro Ivo Lapenna.

Dudeko el niaj eminentuloj provas en ĉi tiu revu-numero skizi la gravecon kaj la gigantecon de la movadaj rolo kaj kariero de prof. Lapenna. Ni timas, ke en la nuna momento tio estas ne nur malfacila sed simple malebla. Nur la jaroj kaj jardekoj, kiuj ankoraŭ venos, helpas al ni senti kaj difini la tutan grandecon de la homo, kiu tra ses jardekoj, tra tri kvaronoj de sia multrilate tempesta kaj unika vivo, dediĉis ĉiun gramon de sia energio, ĉiun eron de sia vastega scio al la afero de la Internacia Lingvo Esperanto. Sen mencii ĉi tie liajn verkojn kaj venkojn, ni

kuraĝas aserti, ke la tuta vivo de Lapenna estas elokventa kaj senkompara leciono pri persisto, tiu kvalito, kiun ni ĉiuj devas havi aŭ akiri, se ni volas — kaj ni ja volas — venki.

La nunan Movadon gvidas lapennistoj. Ni fakte estas ankoraŭ malproksime de klara konsciiĝo ĝis kiu grado ni ĉiuj estas disĉiploj de Lapenna en la grandega plimulto de niaj agoj kaj laboroj por la Zamenhofa lingvo. Ni ankaŭ restos lapennistoj ĝis profunde en la duan jarcenton de Esperanto. Nun, kiam fizike ĉesas kelkaj amaraj kaj tragikaj miskonprenoj, kiuj markis la lastan jardekon de la vivo de prof. Lapenna, eblas trankvile esplori kaj resumi tiun plej brilan, eĉ se foje kontraŭdiran, movadan karieron kaj lekciaron, kiun liveras la vivo de Lapenna. Kiaj ajn estos la konkludoj, unu el ili jam evidentas kaj elstaras: Ivo Lapenna estis la homo, kiu al la Internacia Lingvo Esperanto donis ĝian nunan dignon.

Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA:

La tuta Esperanto-movado funebras la forpason de Ivo Lapenna, unu el la plej grandaj figuroj en la historio de la Internacia Lingvo. Profesoro Lapenna estis la arkitekto de la moderna Universala Esperanto-Asocio. Kiel komitatano kaj estrarano de la Asocio, kaj kiel ĝia prezidanto dum deko da jaroj, li direktis ĝiajn energiojn al la publika prezento de Esperanto al la plej altaj instancoj. Li estas konata kiel ĉefa rolanto en la akceptigo de ŝlosila rezolucio favora al Esperanto ĉe la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Montevideo en 1954 kaj kiel pledanto por Esperanto antaŭ ŝtatestroj, intelektuloj kaj sciencistoj.

La firma kaj senkompromisa sinteno de profesoro Lapenna pri la seriozeco de la pretendoj de Esperanto faris lin granda kontraŭulo de ĉia misuzo kaj misprezento de Esperanto, kaj de sektismo kaj diletantismo. Li insistis pri plej altaj normoj en la lingvouzo kaj pri respekto al la humanecaj idealoj de la Internacia Lingvo. Li estis brila informanto por Esperanto — jam en siaj studentaj jaroj en Jugoslavio kaj poste kiel gvidanto kaj inspiranto de la informa laboro en UEA. Tra ĉiuj malfacilaĵoj kaj seniluziigoj li restis senlaca laboranto

por la lingvo. Li estas aparte memorata kiel brila oratoro kaj talenta verkisto. Multaj ankaŭ memoras lin kiel instruanton kaj inspiranton de tuta pli juna generacio de aktivuloj por Esperanto.

Li estis tutmonde agnoskata ekster la Esperanto-movado kiel gvida figuro en la internacia juro, kaj sian sindediĉon al la idealoj de libereco kaj homaj rajtoj li montris per sia partopreno en la jugoslava lukto kontraŭ faŝismo kaj per multjara studado kaj pledado pri la homaj rajtoj.

Profesoro Lapenna mortis en la Zamenhof-Tago de la Jubilea Jaro de Esperanto. Se lia forpaso markis la finon de unu epoko en la historio de Esperanto, despli gravas, ke ni daŭrigu konscie kaj konsciencie lian laboron en la duan jarcenton. Nenio alia pli bone taŭgas por honori lian memoron.

Al lia vidvino kaj al ĉiuj aliaj liaj familianoj, amikoj kaj kolegoj mi esprimas, nome de UEA, sincerajn kondolencojn.

(Telegramo laŭtlegita ĉe la kremacia ceremonio en Kopenhago, la 19an de decembro 1987.)

Ivo Lapenna (1909-1987)

de Ulrich Lins

IVO LAPENNA ekkreskis en medio tre favora al la estiĝo de tiu internaciema sinteno, kiu lin karakterizis tra la tuta vivo. Split, la urbo, en kiu li naskiĝis la 15an de novembro 1909, dum jarcentoj estis submetita al la influo de italio, kaj Zagreb, kie li abiturientiĝis, studis kaj profesie ekpaŝis, estis proksima al Aŭstrio, al la germanlingva Mezeŭropo. Jugoslavio mem, lia gepatra lando, konsistis el malsamaj lingvoj, nacioj, religioj. Tie regis malfido kaj antagonismo, sed ĉiam ankaŭ la sopiro trovi eliron el la konfliktoj kaj venkigi la komunan homecon super la disigaj diferencoj. En tiu ĉirkaŭaĵo ĉe Lapenna frue vekiĝis la deziro havi kontakton kun pli vasta mondo. Liajn junaĝajn esperojn verŝajne simbolis la vortoj, kiuj slogane aŭdiĝis en Split dum studentoj manifestacioj: “De Split al Vladivostok — ni vojaĝos sen pasport”.

En Zagreb Lapenna elektis juron kiel studfakon, poste specialiĝante pri internacia juro — do, tiu branĉo, kiu okupiĝas pri la orda interrilatado de ŝtatoj. En 1933 li doktoriĝis. (Samjare li, post okjara studado, diplomiĝis kiel mezgrada instruisto de muziko; lia plej ŝatata instrumento estis violonĉelo.) Estis ankaŭ en Zagreb ke Lapenna lernis Esperanton, aŭtodidakte en 1928. Li tuj kunfon-



dis Studentan Esperanto-Klubon, kiu poste akiris famon kiel Akademia Esperanto-Klubo, kaj estis ĝia prezidanto de 1929 ĝis 1941. Li komencis gvidi kursojn (entute 77 ĝis la jaro 1949), publikigis librojn pri Esperanto kaj jam en 1937 iĝis prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo.

Evidente, Lapenna frue impresis la samlandanojn-esperantistojn per sia organiza talento. Sed egale li jam tiustadie kontribuis al difino de la teoria bazo de la agado por Esperanto. Regis eksteraj cirkonstancoj, kiuj estis malfavoraj, eĉ danĝeraj por la Esperanto-movado: En Germanio la nazioj en 1936 dissolvis la Esperanto-organizaĵojn, aliaj faŝismaj aŭ ekstreme dekstraj reĝimoj plifortigis sian premon kontraŭ la esperantistoj. La neŭtrala Esperanto-movado, inkluzive de UEA, reagis je tio per timema silento, mem fermante al si la buŝon per la strut-skrupule observata principo de absoluta neŭtraleco. Tion Lapenna kaj liaj amikoj en la jugoslavia movado ekde 1936/37 komencis akre kritiki. En pluraj tre batalemaj artikoloj en *La suda stelo* li klopodis instrui al la legantoj novan memfidon pri la ideaj elementoj de Esperanto. Pri la persekutoj de la faŝismaj reĝimoj li levis la demandon: “Ĉu pro tio nun malesperi, timi pri la estonteco, humiliĝadi?” Kaj tuj li donis la nean respondon: “Kontraŭe, ni fieru, ke ili — ne konsentas kun ni!” Kiel komunan bazon de la Esperanto-movado Lapenna difinis tion, kio kontraŭas al la principoj de la malamikoj, nome “la ideologion de plena demokrateco, kiu samtempe signifas liberecon, egalecon, toleremon kaj progreson”. La instruo donita de Lapenna estis: ke la esperantistoj ne povas esti neŭtralaj rilate faŝismon; ke Esperanto povas sukcesi nur en medioj, kie floras kulturo kaj progreso; ke ne sufiĉas nur disvastigi Esperanton, sed la esperantistoj per siaj modestaj fortoj faru sian eblon krei tiajn kondiĉojn en la mondo, kiuj faciligas kaj garantias la homajn kontaktojn.

Lapenna ne limigis sin al la enlanda forumo. En 1938 li partoprenis la Universalan Kongreson en Londono kaj, kiel poste memoris kongresanino, “kvazaŭ elektroŝokis la kongreson per maŝinpafilo fluaĵ paroladoj ĝuste pri la temo, ke la interna ideo estas bastiono kontraŭ faŝismo”. La elpaŝoj de Lapenna ne nur trovis grandan eĥon en la londona gazetaro, sed ankaŭ tuj igis lin la favorato de ĉiuj kongresanoj. Li estis elektita estrarano de Internacia Esperanto-Ligo.

La milito interrompis la profesion kaj esperantistan karieron de Lapenna. Fuginte el Zagreb, kie lin minacis aresto, li eniris la partizanan armeon gvidatan de Tito kaj atingis en ĝi fine la rangon de majoro. Post la militfino li ricevis gravajn, respondecajn taskojn en la nova, socialisma Jugoslavio: estro de la informa fako de la kroata registaro, profesoro pri internacia juro en la Universitato de Zagreb, membro de la jugoslavia delegacio ĉe la Pariza Packonferenco (1946) kaj advokato-konsilisto por Albanio en proceso kontraŭ Britio antaŭ la Internacia Kortumo en Hago (1947/48). Li verkis kroate pri Unuiĝintaj Nacioj kaj la historio de diplomatio.

Plue, Lapenna estis prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Federacio. Kaj ankaŭ internacie li restis aktiva. Al lia fakuleco ŝuldiĝas la trovo de realeca formulo por la



Ĉe la UK en Harrogate, 1961.

Reto Rossetti (en Kvaropo (1956)):

Al Ivo Lapenna

Ĉe knal' de via paroltono
en Berno, sub la tablon rampis
la kompatinda mikrofono.
Kun vira belo, voĉimpono,
nian kongreson vi trakampis
kiel paŝtejon la stalono.

Ĉe Malmö belulinoj ringe
enlaŭbis vin, kaj seka "juro"
al ISU logis nin mitinge.

Kaj tie, sponte kaj bellingve
vi vervis pri la "proceduro"
sorĉante ĉiujn sendistinge.

ISU: Internacia Somera Universitato

Poste kun energia volo
Eŭropon vi travojis varbe:
fajra kaj digna apostolo.
Kaj nun, reflegu vin en molo,
pigru, etendu vin subarbe:
do zorgu pri l' kongres-idolo!
1950

pozici-difino de UEA en la postmilita mondo: ĝia ligiĝo kun la idealoj proklamitaj de Unuiĝintaj Nacioj. Jam meze de 1947, proksimume unu kaj duonan jarojn antaŭ la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, al la Statuto de UEA Lapenna aldonigis alineon, laŭ kiu "la respekto de la homrajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo". Same estas la merito de Lapenna, ke la principo de neŭtraleco estis novformulita — en la senco de aktiva neŭtraleco, kiu unuflanke ebligas al la esperantistoj konservi la proprajn mondkonceptojn kaj libere esprimi siajn opiniojn per Esperanto, aliflanke servas kiel ŝirmilo por gardi la sendependecon de UEA kontraŭ difinitaj ideologioj kaj sociaj movadoj.

En la sama jaro Lapenna denove troviĝis en la centro de la atento de la kongresanoj. Dum la UK en Bern kelkaj landaj asocioj, unuavice orienteŭropaj, submetis la projekton de rezolucio, pri kiu ĉiu sciis, ke ĝin vortumis Lapenna. Tiu rezoluci-projekto elradiis decide kontraŭfaŝisman pensmanieron. Sed anstataŭ limigi sin al la kondamno de la faŝismaj krimoj la teksto alvokis ankaŭ al senkompromisa batalo kontraŭ "provokantoj de nova milito". La lingvaĵo nepretervideble respegulis la tonon de propagando, kiun tiutempe disvastigis stalina Sovetunio

kaj ĝiaj aliancanoj. Multaj okcidentaj kontraŭfaŝistoj sekve ne pretis voĉdoni por la projekto. Ŝanĝojn, kiuj farus ĝin akceptebla por plimulto, Lapenna kategorie rifuzis, tiel ke la rezolucio estis malakceptita. La incidento demonstris la eksterordinaran volforton kaj batalemon de Lapenna, sed same ilustris lian nekapablon kompromisi aŭ konfesi erarojn. Ankoraŭ en 1980 Lapenna defendis sian rezoluciprojekton, tamen prisilentante ĝuste tiun parton, pro kiu li en la voĉdono malvenkis.

En 1949 Lapenna forlasis Jugoslavion (kaj neniam poste revenis al ĝi). Pri la kialoj de tiu foriro li neniam publike parolis: Kredeble temis pri kombinaĵo de personaj kaŭzoj kaj de malkontento pro la politika evoluo en la lando. Sekvis la pezaj komencaj jaroj de elmigrinto, unue en Parizo, kie en 1950 aperis la unua eldono de lia fama *Retoriko*. Ekde 1951 li loĝis en Londono, kie li poste iĝis brita ŝtatano. En 1956 li eniris la renomatan London School of Economics, kie sinsekve li estis scienca kunlaboranto, lekciisto, docento kaj profesoro. Kiel frukto de lia specialisteco pri kompara soveta kaj orienteŭropa juro aperis kvar libroj (en la franca, angla kaj Esperanto) kaj pluraj artikoloj. En 1977 li estis pensiita.

La venko de Montevideo

Estis la rolo de Ivo Lapenna en akceptigo de la unua Unesko-rezolucio favora al Esperanto en 1954, kiu plej famigis lin tra la Movado. La jam konata oratoro kaj movada gvidanto ekestis figuro de mitaj proporcioj. Kaj ne senmerite: ĉar tiu unua oficiala rekono de Esperanto en la postmilita mondo estis sendube la plej malfacila, kaj ankaŭ — ĉar la unua — la plej valora tia paŝo en la movada historio.

Ĉar hodiaŭ malmultaj konas la detalojn de tiu triumfo, ni ĉi tie prezentas resuman rakonton surbaze de la raporto en *Esperanto*, februaro 1955.

La grundon oni komencis prepari jam en 1950, kiam reprezentantoj de UEA transdonis al Unuiĝintaj Nacioj Petskribon pri Esperanto, subskribitan de 492 internaciaj organizaĵoj kaj preskaŭ 900 000 individuoj. En la sekva Ĝenerala Konferenco de Unesko (Parizo, 1952), zorgaj antaŭpreparoj de Lapenna, Privat, Durrant kaj aliaj sukcesis akceptigi rezolucion (de la svisa delegacio) por diskonigo de la Petskribo kaj decido pri ĝi kadre de la venonta Ĝenerala Konferenco en Urugvajo (Montevideo, 1954).

Dum 1953 Lapenna, sub la ŝildo de CED, kunordigis internacian informkampanjon celitan al naciaj Unesko-instancoj kaj intelektulaj medioj. Samtempe UEA komencis kolekti monon por sendi reprezentanton al Montevideo, kaj fine de 1953 ekkompilis materialon por samokaza Universala Ekspozicio. Dum 1954 la esperantistoj klopodis konvinki iun nacian delegacion al propono de konkreta rezolucio ĉe la Konferenco, sed sensukcese. Fakte la Unesko-raporto pri la Petskribo, kiu aperis en junio, estis sufiĉe malesperiga: nur dek landoj reagis pozitive, dum dek naŭ esprimis sin kontraŭ ia favora sekvo al ĝi.

Tiel statis la aferoj, kiam Lapenna aperis en Montevideo la 1-an de novembro. La tuton de tiu monato li pasigis en preparlaboroj, kontaktante pli ol 300 delegitojn kaj mastrante la pretigon de la Ekspozicio. (Tiu lasta montriĝis ŝlosila en la varbado de apogantoj, kaj oni devas admiri la klarvidon, kiu antaŭpretigis ĝin.) Finfine la 2an de decembro li sukcesis konvinki la meksikian delegacion proponi rezolucion pri Esperanto: la saman vesperon ĉirkaŭ 30 aliaj delegacioj promesis subteni ĝin. Du tagojn poste la Programkomisiono, kiu unua devis decidi pri reago al la Petskribo (kaj de du tagoj prokrastis ĝian pritrakton), alvenis al tiu tagorda punkto.

Estis tiam, post prezento de la meksikia rezolucio, ke okazis la fifama interveno de la dana lingvisto Blinkenberg, kiu uzis sian paroladon por ridindigi Esperanton per aro de lerte kunplektitaj mensogoj. Lapenna ricevis nur tri minutojn por paroli entute, kio post tia malicaĵo kompreneble montriĝis nesufiĉa: per 23 voĉoj kontraŭ 3 kun 19 sindetenoj la komisiono rifuzis la rezolucion. Lapenna sukcesis atingi nur, ke ĝi tamen akceptis la Raporton faritan de la Sekretariato en junio, tiel certigante ke Esperanto estos remenciita en la ferma Plenkunsido post unu semajno.

Tamen la ludo ŝajnis finita, ĉar ekzistis neniam proceduro per kiu reenmeti la rezolucion. Sed Lapenna rifuzis cedi. La saman vesperon li kaj membroj de la Urugvaja Esperanto-Societo kunmetis protestleteron, kiun ili dissendis en la hispana al deko da gazetoj; la morgaŭan matenon ili resendis al la Dana Konsulejo ties kulturfilmon en Esperanto. Kaj, mirakle, la afero kaptis la intereson de la urugvajaj ĵurnaloj. (Interalie Blinkenberg faris la eraron diri — kun implica insulto — ke Esperanto taŭgas nur por urugvajaj menuoj.) Ene de tri tagoj, la rifuzo en la Programkomisiono fariĝis unu el la plej diskutataj temoj en Montevideo.

Tiun atenton Lapenna brile eluzis. Post ol fari intervjuojn ĉe radio kaj ĵurnaloj, li formulis tre ekvilibrantan leteron al la konferenca prezidanto, kiu matene de la 9a estis dissendita al ĉiuj delegacioj. La reeĥoj estis tiel pozitivaj, ke li samtage petis permeson paroli en la fermkunsido kiam la Petskribo remenciĝos. Tion rifuzis la konferencaj gvidantoj: sed persona interparolado

kun Lapenna, dum la lasta horo antaŭ la komenco de la Pleno, persvadis ilin resubmeti la meksikian rezolucion al ĝenerala voĉdono (sen iu kontraŭata punkto 4) kiam leviĝos la akcepto de la Petskribo.

La inundo de gazetaraj artikoloj kaj radioelsendoj en la antaŭaj tagoj pruviĝis decidiga. Preskaŭ sen diskuto kaj sen kontraŭstaro, la rezolucio akceptiĝis en la Plenkunsido per 30 kontraŭ 5 kun 17 sindetenoj; kaj inundo de aplaŭdoj kaj gratuloj, eĥota poste en Esperantogazetoj ĉirkaŭ la mondo, salutis la "heroon de Montevideo", en kies kariero — plena de triumfoj — verŝajne nenio povis superi la ekzulton de tiu momento. Eble nun post 30 jaroj, kiam la kunlaboro kun Unesko jam rutiniĝis kaj intertempe venis plia rezolucio, tiu atingo ne plu ŝajnas tiel granda; sed en tiu tempo kaj kunteksto, ĝi estis tertremo.

Kalman Kalocsay:

Montevideo 1954

Lapenna venkis ĉe Unesko
Per strategi' kaj streĉo nerva:
El la lastvica seĝ' observa
Grandiĝis kun mirakla kresko
Ĝis alto de l' plafona fresko.
Jes, la nerezisteble verva
Lapenna venkis ĉe Unesko
Per strategi' kaj streĉo nerva.

Kia ŝakmajstra fosforesko
De cerbo ĉiam brile serva!
Indigna, sed trankvilkonserva
Pri l' aĉa Blinkenberg-burlesko,
Lapenna venkis ĉe Unesko.

En 1954 komenciĝis la dudekjara periodo, dum kiu Ivo Lapenna ludis la plej elstaran rolon en UEA kaj la Esperanto-movado entute. Akirinte vastan popularecon kiel “heroo de Montevideo” pro sia komence senespera, fine triumfa lukto por rekono al Esperanto fare de Unesko (*vidu apartan tekston -red.*), li iĝis ĝenerala sekretario de UEA en 1955. Ne estas troigo aserti, ke ĉiuj gravaj iniciatoj kaj atingoj de la Esperanto-movado ekde la komenco de la 1950aj jaroj estas pli aŭ malpli rekte la merito de Lapenna: la fondo de CED, la starigo de Internacia Somera Universitato, la aĉeto de domo de UEA en Rotterdam, la sekciigo de TEJO, la vastigo de la karaktero de la UK, la subskribo-kampanjo por propono al UN, la ekaperigo de la revuo *La Monda Lingvo-Problemo*. . .

Lapenna havis unu organizan ĉefcelon: establi la movadon antaŭ la okuloj de la ekstera mondo kiel seriozan, tutmonde atentindan movadon. Li konsciis, ke tion atingi ne eblas nur per deklaroj direktitaj al Unesko, sed ke la necesa premiso por la efikeco de tiuspeca argumentado estas la eduko de la membraro. Ĝuste tial la plimulto de la publikaj elpaŝoj de Lapenna konsistis el organizaj lecionoj, mobilizaj artikoloj, alvokoj, avertoj, admonoj. Li senŝancelle pledis por likvido de ĉiuj eksteraj signoj de interna entuziasmo, kiuj minacis stampi la movadon kiel sektecan. Estis lia deziro transformi la heterogenan “esperantistaron” en disciplinitan movadon, kies devizo devus esti “Unueco super ĉio”. La Principaro de Frostavallen (1956) — plia verko de Lapenna — celis konsciigi al la esperantistoj, kiomgrade ili mem — neintence — riskas malhelpi la progreson de Esperanto. Multaj tro longe kroĉis sin al la erara kredo, ke samideaneco identas kun solidareco; sed ni povis konstati jam komence de la 1970aj jaroj, ke interalie dank’ al la senlaca insistado de Lapenna konsiderinde serioziĝis la publika bildo de la esperantistoj.

La efikon de la konstantaj admonoj de Lapenna grave akcelis lia propra modelo, lia ŝajne preskaŭ neelĉerpebla energio. Kiam en 1964 li estis elektita prezidanto de

UEA — pozicio, kun kiu ĝis tiam ligiĝis pli honoro ol laboro, li plue plenumis taskojn, kies amplekso superis la laborkvanton de ĉiuj liaj kunestraranoj kune. Neniu povis mezuri sin kun li rilate diligenton, atentemon, fizikan forton kaj entuziasmon. Decas ĉi-loke dediĉi dankan senton ankaŭ al lia dua edzino Ljuba, forpasinta du jarojn pli frue, kiu dum jardekoj plenumis la plej multajn sekretariajn taskojn por la edzo. Kaj kiu ne memoras la kongresajn paroladojn de Lapenna, oratorajn majstroverkojn, kies stimulan, korvarmigan efikon neniu povis rezisti! Ovacioj regule superŝutis tiun voĉe kaj aspekte imponan homon, kiu impresis tiel kredinda al siaj aŭskultantoj pro la rara simbozio de retoriko kaj pruvita agoforto. La esperantistoj sopiris ĝui la ĉeston de Lapenna ankaŭ ekster la UK, dum aliaj aranĝoj. Kiom ni en Germana Esperanto-Junularo fieris en 1961, ke Lapenna unuafoje partoprenis nian novjaran seminarion! Por mi mem tiam komenciĝis plurjara persona kontakto kun Lapenna, kulminonta en la komuna redakto de la verko *Esperanto en perspektivo* (1974) — laboro fruktodona, instrua kaj tial volonte memorata.

Aliflanke, la eksterordinara personeco de Lapenna neeviteble kondukis ankaŭ al polarizo en la movado. Tio parte estis sekvo de la radikala sanigo, al kiu Lapenna submetis la movadon. Lia klopodo apliki normojn de kultura-socia movado kunpuŝiĝis kun la “amikeca” etoso de la “samideanoj”, faktoro tre grava en la komenca periodo de Esperanto, sed poste ofta bremsilo de progreso kaj kaŝilo de konfliktoj. Per la ignoro de kariĝintaj sentimentoj, per la rompo kun balastaj tradiciaĵoj kaj per la senkompata batalo kontraŭ negativaĵoj (kiujn pli frue oni kutimis balai sub la tapiŝon de samideaneco) Lapenna necese kreis al si kontraŭulojn.

Aldoniĝis al tio, precipe en 1955/56, politikaj akuzoj kontraŭ li. Manpleno da usonaj esperantistoj, sub influo de la kontraŭkomunisma histerio de Joseph MacCarthy, vidis en la poststalina revigliĝo de la Esperanto-movado

ruzan manovron de Moskvo, denuncis Lapenna kiel danĝeran komuniston kaj lanĉis kampanjon kontraŭ kvazaŭa “komunista infiltrado en la Esperanto-movadon”. (Nur nuntempuloj scios plene aprezi la paradokson de tiuj akuzoj.) Lapenna povis rebati la atakojn, sed ili postlasis ĉe li profundan vundon. Al la ofte malfacile komprenebla necedemo, montrita ekzemple en Bern, aldoniĝis ekstrema sentemo, kreskanta ĝis tia grado, ke Lapenna komencis vidi ankaŭ en objektiva kritiko atakon kontraŭ si persone. Liaj rebatoj estis tiel akraj, ke eĉ mediokruloj* povis esti certaj pri iom da famo — kalkulante pri tio, ke iliajn atakojn la kolero de Lapenna tuj plenblo-

* *mediokra: senvalore mezkvailita*



vos al eksterproportia graveco. Apartenas al la sama kunteksto, ke Lapenna, ĉiam tre konscia pri la rekono, kiun trovu lia agado, pli kaj pli toleris aŭ eĉ kuraĝigis iuspecan kulton ĉirkaŭ si.

Jam fine de la 1960aj jaroj kreskis la malkontento pro lia “obsedo pri atakoj kaj misprezentoj”. La fino de la postmilita epoko alproksimiĝis ankaŭ en la Esperanto-movado. Sendepende de la pravo de Lapenna, multaj simple laciĝis pri liaj revolucia patoso, batalema konduto kaj

neflekseblo. Tiuj trajtoj de Lapenna, alproprigitaj en la partizanaj taĉmentoj kaj partiaj ĉeloj de kummilita Jugoslavio kaj nun senreziste plu efikantaj nur interne de la Esperanto-movado, malrapide sed nehaltigeble akiris anakronisman odoron. Kvankam li kelkfoje mem aludis pri la generacia problemo, li ne sukcesis tiri en la estraron de UEA homojn taŭgajn por posteuleco. (En oktobro 1973 Lapenna invitis Humphrey Tonkin iĝi ĝenerala sekretario, sed tiu ĝentile rifuzis.) Tial fine, en 1973/74, iom heterogena rondo de aktivuloj — inter ili eksestraranoj de UEA, TEJO-funkciuloj, aktivuloj de landaj asocioj, en malfrua stadio ankaŭ de orienta Eŭropo — serĉis manieron, kiel anstataŭigi Lapenna per nova prezidanto kaj lin mem levi al la pozicio de Honora Prezidanto. Tiu plano nur parte sukcesis. Tonkin iĝis la nova prezidanto de UEA, sed Lapenna jam antaŭ tio, vidante ke li ne havas ŝancon esti reelektita, je ĉies surpriziĝo anoncis sian kompletan retiriĝon el UEA. La kongreson de Hamburgo en 1974, kie tio okazis, skuis emocia tertremo. Neniu ĝojis, ke la longa, impona kariero de Lapenna finiĝis tiel abrupte. Male, sian dankan ŝuldon la kongresanoj esprimis al li per kelkminuta ovacio.

Nenio tamen sufiĉis por kuraci la vundon de tiu unuola sed por Lapenna profunde humiliga malvenko. Jam antaŭ Hamburgo li estis veneninta la atmosferon per sia aprila ĉefartikolo en *Esperanto*: “UEA en danĝero de malintegriĝo”. Nun, tuj post la UK, li lanĉis kampanjon kontraŭ tiel nomata “kontraŭneŭtraleca politika konspiro en UEA”. Ankoraŭ en 1985 li asertis, ke la hamburgaj eventoj “malfermis la pordon al senbrida sovetsma agitado-propagando en la sino de UEA”. Tiujn tezojn Lapenna disvastigis en libro (*Hamburgo en retrospektivo*) kaj en sennombraj artikoloj, bedaŭrinde ankaŭ naci- lingve.

Esperantistoj plue malŝatas konfliktojn, eĉ la necesajn. Tial kaj pro la morto de Lapenna eble ŝajnas nekonvene



Malĝojiga foriro: La 59a Universala Kongreso fariĝis neintencita adiaŭo.

Alproksimiĝas la fino de la Jubilea Jaro. . . Sur internacia nivelo elstaras la Jubilea Esperanto-Konferenco en Graz, la UK de UEA en Varsovio, la Festivalo en Zagrebo kaj la Jubilea Kongreso de SAT. . . El esperantisma vidpunkto certe la plej pozitiva evento estis la lastmomenta interŝanĝo de salutoj kaj bondeziroj inter SAT, UEA kaj ICNEM.

Ni ne eniros en la detalojn de la negativaj aspektoj. . . Alia afero estas progresi la lingvon. Tion UEA povos atingi nur per ĝustaj agadoj direktitaj al ĝustaj medioj, esence laŭ la principoj aplikataj ĝis Hamburgo 1974, surbaze de aktiva neŭtraleco kaj absoluta sendependeco.

(El la lasta ĉefartikolo en *Horizonto*)

denove suriri la terenon de polemiko. Sed mi opinias (ankaŭ memorante, ke al Lapenna oni certe ne povas riproĉi mankon de kuraĝo aŭ malkaŝemo), ke necesas ĉi-loke tute klare konstati tion ĉi: Tra tiom da jaroj Lapenna neniam sukcesis pruvi siajn asertojn, ke en Hamburgo okazis “puĉo” aŭ ke UEA iam deflankiĝis de sia neŭtraleco kaj de la Zamenhofa idearo. Estas vero, ke antaŭ Hamburgo okazis agoj de junula petolemo, mallertaĵoj, personaj el-reliĝoj, kaj sendube estis ankaŭ unuopaj kazoj de malaprobinda premo, sed ĉio ĉi ne adiciĝas al tiu giganta

konspiro, kiun Lapenna provis kredigi al la esperantista publiko. Same liaj provoj premi la estraron de UEA al enmiksiĝo en la internajn aferojn de landaj asocioj kontraŭis lian propran agadon kiel prezidanto, kiam li bremsis provojn de interveno kaj anstataŭe preferis klopodi pri ŝanĝoj de misaĵoj per la nepublika, diplomata vojo. En tio kiel en multaj aferoj, la posthamburga UEA sekvis la daŭre validan ekzemplon de Lapenna mem.

Per la sloganoj pri puĉo kaj konspiro Lapenna impresis kelkajn, precipe nepolitikemulojn. Sed kio estas pli notinda: Estis surprize malmultaj, kiuj pretis aktive partopreni lian kampanjon — kaj el tiuj pluraj certe nur pro persona lojaleco al Lapenna. Tragedie, li dum la lastaj dek jaroj de sia vivo pli kaj pli falis en la rolon de eksterulo, kies atakojn la plej multaj esperantistoj kvitancis per silento — per embarasita silento, kia kaptis precipe tiujn, kiuj memoris liajn grandajn meritojn. Dum sia lasta vivojaro li komencis milidigi sian polemikadon kontraŭ UEA. Eble ja temis pri ia malfrua rekono, ke lia propra konstruaĵo ankoraŭ staras esence sendifekta; ankaŭ la UK en Varsovio li salutis per telegramo, kiun oni legis en la Inaŭguro. Sendube la kongresanoj, same kiel de post 1974 preskaŭ ĉiuj movadanoj, preferis kaj plue deziras memori tiun Lapenna de la unuaj kvar jardekoj, kiu konstruis la modernan UEA kaj edukis ankaŭ grandan parton de la nunaj agantoj.

Ne ekzistas esperantisto, kiun ne influas — eĉ se preterkonscie — la kvarona jarcento, dum kiu Ivo Lapenna ĉefrolis en la internacia agado de la Movado. Rekone al tiu fakto, ni malfermis kvar paĝojn de ĉi tiu numero al la taksoj de elstaraj movadanoj ĉirkaŭ la mondo pri liaj vivo kaj agado.

Ludoviko Zaleski-Zamenhof (Parizo):

Mi ĵus informiĝis pri la granda perdo, kiu trafis la tutan Esperanto-movadon je la 15a de decembro, kiam en Kopenhago forpasis profesoro d-ro Ivo Lapenna, unu el la plej valoraj kaj plej fervoraj disĉiploj de la ideoj de mia avo en la tuta historio de la Internacia Lingvo. Mi ankoraŭ memoras, ke en la jaro 1937 mia patro Adamo akceptis la tiam junan doktoron Lapenna, kiun mi ĉiam poste konsideris esti kvazaŭ persona amiko de mia familio.

Mi petas UEA afable transdoni miajn plej profundajn kunsentojn al la familio de la forpasinto same kiel al la tuta esperantistaro.

Gaston Waringhien (Francio):

La unua figuro, kiu leviĝas en mia memoro, estas tiu de la oratoro. Li posedis ĉiujn naturajn donitaĵojn: fortikon de la brusto, potencon kaj koloron de la voĉo, amplekson de la memorkapablo; li perfekte scipovis nian lingvon kaj la sekretojn de la arto; li aplikis sian talenton al la defendo de noblaj ideoj. Ĉio tio klarigas, kiel liaj libroj *Retoriko*, kiu elmetas la metodon, kaj *Elektitaj paroladoj*, kiuj liveras la modelojn, estas verkoj de konstanta utiligebleco kaj de vasta kulturo. Kaj mi estas fieraj, ke li elektis min por antaŭparole prezenti ilin al la publiko.

Sed apud tiu figuro tuj prezentiĝas alia, kiu donas al la unua ĝian valoron kaj profundecon: kiel forgesi la liberamanton, kiu, dufoje en sia vivo, havis la kuraĝon rompi jam brilan karieron, forlasi la komfortaĵojn de la hejmo, por sekvi kaj servi sian idealon homaranisman, kaj en la subtera batalo kontraŭ naziismo kaj en la memvola ekzilo el la hejmlando por ne kompromiti sin kun stalinismo?

Eĉ se oni preterlasas la ceterajn flankojn de lia talento kaj agado, Lapenna lasas al ni, personigitan en liaj ĉiam relegendaj verkoj, la neforgeseblan tipon de granda spirito, kiu tutkore sin dediĉas al Esperanto.

Marjorie Boulton (Anglio):

Mi memoras multajn okazojn, kiam li donis sian tempon, meze de tre okupitaj tagoj, por fari ian kuraĝigan aŭ konsolan geston al iu persono neniel por li aŭ la Movado grava. Mi memoras lin, ĉirkaŭ 1956, inter simplaj seminariaj studentinoj, nuraj komencantinoj, tute ĉarman, instigan, simpatian; memoras ankaŭ kiel iam li iris iom longan distancon, laŭ invito, al grupeto de junuloj, en la vespero de laciga tago, kaj (verŝajne pro nura needukiteco) tiuj akceptis lin senrespekte, eĉ sonigante muzikbendon dum li parolis pri Esperanto, eĉ neniel dankante — kaj kiel paciencie tiu jam fama homo kondutis. . . Nu, kaj mi memoras kiel iam en Frostavallen, pro diverseco de opinioj, ni dolore publike kverelis — kaj kiel, la sekvantan matenon, komencante per ŝerca bojado, li same publike kaj tre varme, amike, iom humure malkvereligis nin — kvankam mi

retenis mian opinion. Kaj kiel, nur naŭ monatojn antaŭ sia morto, jam malfortiĝante, li vojaĝis de Wembley al Oksfordo por fari ceremonieton helpe al nur eta loka societo.

Dum ni memoras pri tiu titano de intelekto, labor-energio, sinoferado kaj fideleco al principoj, jen kelkaj detaletoj pri alispeca grandanimeco kaj esenca bonkoreco.

Juan Régulo Pérez (Kanariaj Insuloj):

Unuafoje mi renkontis Ivo Lapenna en 1955, dum la Bologna UK. Ekde tiu jaro nin ligis firma amikeco, kiun daŭre intensigis 32 jaroj da kunstreboj. Tuj min sorĉis lia virtuo-zeco pri ĉarmaj konversacioj dum longaj vesperoj. Same kiel lia verva oratorarto, lia konversaciado estis unike altira.

Lapenna naskiĝis en katolika medio kaj dum sia juneco fariĝis fervora marksisto. Tiu unua edukiĝo, en du totalismaj etosoj, profunde stampis lian personecon. Tial liaj konceptoj pri hierarĥio kaj pri disciplino solide fiksiĝis en lia memo, same kiel la koncepto pri la propra neerarivo; tial lia obstina volismo. Sekve okazis fojfoje konfliktoj, kiel kiam, tute demokrate, li ne reelektiĝis prezidanto de UEA en 1974, kaj de tiam li ĝin nur atakis: ĉar ja por li UEA estis, aldone, povdemando.

Resume, Ivo Lapenna estis la homo, kiu pleje kontribuis al la indo de la nuntempa esperantismo. Per sia giganta vivoverko, en kiu li neniam rezignis siajn esencajn tendencojn, Ivo Lapenna plue vivas en ni ĉiuj: li atingis la esperantujan senmortecon.

Ralph Harry (Aŭstralio):

En la morto de Ivo Lapenna la Esperanto-movado perdis multifacetan aktivulon. Sed super ĉio li estis juristo, kiu elmontris, ke Esperanto kapablas esprimi precize ĉiujn nuancojn de la jura lingvaĵo. Li faris tion ne per teoriaj argumentoj sed per la verkado de profesie seriozaj, ofte brilaj artikoloj pri aktualaj problemoj de la juro, nacia kaj internacia. Dum jardekoj li verkadis por diversaj Esperanto-periodaĵoj kaj precipe por *Internacia jura revuo*, de kiu li estis la motoro, trafajn tezojn pri la homaj rajtoj kaj pri internacia kaj kompara juro. Kiam mi ektradukis la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj kaj la Ĉarton de Unuiĝintaj Nacioj, mi trovis preskaŭ ĉiujn fakajn terminojn en la fakaj verkoj de Lapenna. La fakaj radikoj en PIV, pri kiu li estis kunlaboranto, ne estis porokaze elpensitaj por la vortaro sed estis vortoj jam en praktika uzo.

Eble lia plej grava atingo estis stimuli, inspiri kaj kunlaborigi centon da juristoj de diversaj landoj sur la jura kampo, per IJR kaj prelegoj en fakaj kunvenoj dum kongresoj. La plej taŭga tributo al lia memoro estus refondo de la Internacia Asocio de Esperantistaj Juristoj, aŭ almenaŭ la daŭrigo de internacia revuo kaj la evoluigo de la jura terminaro.

Detlev Blanke (Germana DR):

Sen iu ajn dubo prof. Ivo Lapenna tre rimarkeble kaj pozitive influis la postmilitan Esperanto-movadon kaj multajn nuntempajn aktivulojn, inkluzive min mem, kiu tamen ĉiam gardis rilate al li — krom estimo — ankaŭ motivitan kritikan distancon, precipe dum la lastaj 13 jaroj.

Inter la multaj meritoj de la forpasinto mi volas aparte elstarigi lian kompleksan — ni diru dialektikan — aliron al la “monda lingvo-problemo” (mi aludas al la revuo de li kunfondita en la jaro 1969), aliro metodologie tre fekunda por modernaj interlingvistikaj konceptoj. Tre gravaj ankaŭ estis liaj impulsoj por pli moderna publika prezento de Esperanto (Principaro de Frostavallen), laŭ kiuj oni devus pluiri. El lia tuta vivoverko por Esperanto — pri tio certe samopinias liaj amikoj kaj kritikintoj — superregos kaj fariĝos historiaj liaj pozitivaj kontribuoj.

Chen Yuan (Ĉinio):

Kun granda ĉagreno ni perdis Ivo Lapenna kiam alproksimiĝis la fino de la Jubilea Jaro. Estis Lapenna kiu antaŭenpuŝis la Esperanto-movadon en la internacian sacion post la dua mondmilito. Ĉiu memoras ke estis Lapenna kiu elokvente pruvis al la internacia publiko ke Esperanto estas la plej taŭga kaj efika komunikilo por ĉiuj popoloj dum la fame konata Unesko-konferenco.

Kiel granda oratoro li multe kontribuis al la parola Esperanto-kulturo. Kiel sciencisto li verkis multe por la lingvoscienco, i.a. interlingvistiko, kaj por la internacia juro. Kiel organizanto li fondis la esploran centron de Esperanto, se ne menciis la kontribuojn al la organiza laboro de UEA kaj poste de ICNEM. Kiel amiko de la ĉina popolo li alte aprezis la sukcesojn de la Popola Respubliko kaj ankaŭ la lingvaĵon kaj enhavon de EPĈ kaj de Radio Pekino.

Lapenna forpasis, sed lia senlaca batalo kaj laborado, lia sinoferema persisto por Esperanto restas por ĉiam valora heredaĵo por la tuta esperantistaro tra la tuta mondo.

William Auld (Skotlando):


Ĉiu, al kiu la afero Esperanto estas kara kaj grava, devas rekoni la grandiozan kontribuon de Ivo Lapenna al nia movado, precipe en la jardeko post la Dua Mondmilito. Li unuigis la movadon disduiĝintan antaŭ tiu milito, kaj per laciga prelegvojaĝo tra multaj landoj alportis novan inspiron al kluboj kaj societoj. Per serio de brilaj oratoraĵoj li insistis reformis la iom naivan ideologion de la esperantistoj, kaj altigis la nivelon de kulturaj kaj kongresaj aranĝoj. Li translokigis la asocian oficejon el la angla kamparo al la centro de grava urbego kaj profesiigis la administradon. Kaj kompreneble li atingis ĉe Unesko malgraŭ nekredeblaj malfacilaĵoj la plej gravan kaj daŭran oficialan rekonon en la historio de la movado.

Sen liaj energiego kaj kuraĝo la movado hodiaŭ certe ne estus tia, kia ĝi dankinde estas. Lia tragedio, en mia opinio, estis ke li ne sciis evolui kaj adaptiĝi al novaj movadaj cirkonstancoj. Mi laste interparolis kun li antaŭ du jaroj, kaj mi miris kaj malĝojis pri tio, ke ĉiu lia parolo ŝajnis nur pala fantomo de tio, kion li diris antaŭ tridek jaroj. Malgraŭ tio, tamen, li plene meritas tiun honoron, kiun aljuĝos al li la historio de Esperanto.

Ivo Borovečki (Jugoslavio):

La morton de prof. d-ro Ivo Lapenna priploros precipe la jugoslavia esperantistaro, ĉar li naskiĝis en nia lando, en ĝi li fariĝis esperantisto kaj dum du jardekoj malavare donadis al la landa movado siajn scion kaj sperton, sian admirindan elokventecon kaj sian neelĉerpeblan energion.

Jam en la jaro 1928 Ivo Lapenna fondis Akademian Esperanto-Klubon en Zagreb kaj baldaŭ ĝi fariĝis vera torĉo de progresema tendencoj en la landa movado. En la tridekaj jaroj li sukcesis organizi fortan kaj unuecan Jugoslavian Esperanto-Ligon. Tre gravan rolon ludis liaj instigaj ĉefartikoloj en *La suda stelo* kaj li gvidis sennombrajn prilingvajn kursojn. Post la milito li energie renovigis



la movadon en ĵus-liberigita lando, inkluzive de la fondo de Jugoslavia Esperanto-Federacio, la reaperigo de la *La suda stelo* kaj la organizo de mejloŝtonaj kongresoj. Per ĉio ĉi Ivo Lapenna postlasis al ni neforgeseblajn spurojn de sia multflanka kaj sukcesplena poresperanta agado.

Baldur Ragnarsson (Islando):

Kiel gimnaziano kaj Esperanto-studento mi unue aŭdis la voĉon de Ivo Lapenna pere de la islanda ŝtatradio, en 1949. Persone mi konatiĝis kun li nur lastsomere, en la Esperanto-konferenco en Graz. Inter tiuj tempolimoj mi povis sekvi lian esperantistan agadon nur pere de informoj. Mi ankaŭ legis liajn librojn. Tia diversvoja prikonigo konstruis en mia menso bildon de homa celkonscia, energia kaj sindonema. Pro lia malsano niaj personaj rilatoj povis esti nur mallongedaŭraj. Ili tamen aldonis novan trajton al tiu bildo: superbon ecigitan de lia karaktero kaj de liaj grandformataj spertoj. Tiu superbo, klare konstatebla malgraŭ lia malbona sanstato, facile transformiĝis al homa varmeco je la plej eta okazo, kiel ĉe manĝotablo aŭ manpremo. Iel mi sentis, ke ĝuste tiu varmeco estis tre grava kuntenilo ĉe lia personeco. Mi estas ege danko al la sorto ke mi havis la okazon proksimiĝi al tiu granda homo, kvankam malfrue, kaj ke mi povis kontribui al lia lasta manifestado omaĝe al Esperanto, la prelega serio en Graz.

Ulla Luin (Svedio):

Kiam mi aŭdis pri la morto de profesoro Lapenna, mi malĝojis. Li havis grandan signifon por mi en mia junaĝo.

En la kvindekaj jaroj li estis unu el la ĉefaj personecoj en la svedaj someraj aranĝoj en Frostavallen. Aliaj personoj faris la grandan laboron de organizo, sed profesoro Lapenna estis la centro de la diskutoj. Eĉ por infano, lia ĉarmo, lia kapablo kapti la intereson de la aŭskultantoj, kaj lia rido kun la ora dento estis signifaj.

Poste, kiam mi estis junulino, lia profesia kapablo pri juro kune kun lia kapablo esprimi tion en Esperanto, estis unu el la faktoroj kiuj igis min ekaktivi en la Esperanto-movado.



John Wells (Anglio):

Lapenna estis giganto de la movado. Tion povas ĉiu rekoni.

Mi ekkonis lin kiel studento en la fruaj 1960aj jaroj, kiam mi venis unue al Londono; li estis docento en la sama universitato. Lia influo al mi estis duflanka: movada kaj lingva. Li lernis de mi (pli ĝuste: parte de mi) unu aferon: konduki aŭton.

Per sia ekzemplo kaj per sia argumentado li montris, ke oni devas trakti la Esperanto-movadon kiel intelekta seriozan aferon, indan je la plej alta profesia kvalito. Kiel pasie li pledis kontraŭ amatoreco kaj diletantismo! Kaj ĉar li mem travivis la partizanan batalon, li igis min kompreni ke politikaj ideoj ne estas nuraj abstraktaj teorioj, sed havas drastan efikon al la vivo kaj morto de homoj.

Li havas gravan rolon en mia lingva formiĝo. Mi admiris la logikemon kaj klarvidan argumentadon, kiujn li alportis al niaj multaj lingvaj diskutoj. Eble pli grave por mi, lia Esperanta lingvaĵo — cetere bonega — estis tute sen influo de la angla lingvo (mia gepatra lingvo, sed por Lapenna konata nur ekde meza aĝo). Dum la tuta periodo, kiam mi firmigis mian propran lingvoscion kaj entreprenis la kompiladon de mia vortaro *Teach Yourself*, li montris manierojn liberigi min de la katenoj de la angla; mi ŝuldas al li centojn da naturaj parolturnoj.

Tibor Sekelj (Jugoslavio):

Mi konatiĝis kun Ivo Lapenna en la komenco de mia Esperanta vivo, antaŭ 58 jaroj, ĉe la fondo de la Akademia Klubo en Zagreb. En tiuj studentaj jaroj mi admiris liajn gvidajn kvalitojn kaj lian talenton fanatike batali por siaj konvinkoj. En tio mi fariĝis lia disĉiplo, kaj restis tio eĉ kiam lia talento turniĝis kontraŭ min kaj mian agadon.

Dum lia multjara gvida rolo en la Movado certigas al li elstare gravan lokon en la historio de Esperanto, la negativaj ecoj kiuj akumuligis ĉe li kun la tempo perdos gravecon. Lia spirita postlasaĵo ankoraŭ plene funkcias en la Movado, kaj ni devos fari fortostreĉon por debarasiĝi de tiuj trajtoj, kiujn la tempo igis nenecesaj.



“Brila pledanto por Esperanto. . .” De maldekstre: Renkontante la Prezidanton de Aŭstrio, Franz Jonas, en 1965; ĉe UN en 1966, transdoninte la Proponon pri Kunlaboro al la Asista Ĝenerala Sekretario, Chakravarthi Narasimhan; aŭskultante hungarajn lernantojn en 1971.

Nikolaj Aleksiev (Bulgario):

Ivo Lapenna estis la plej populara figuro en la Esperanto-movado eĉ kiam li ne plu estis prezidanto de UEA. Ĉar ne la posteno, ne la titolo difinis lian signifon por la evoluigo de la moderna pozicio de nia lingvo kaj movado, sed liaj personaj kvalitoj de organizanto, oratoro, inda reprezentanto de la esperantistaro antaŭ la plej altaj neesperantistaj instancoj kaj institucioj.

Al li ĉefe apartenas la sendube pozitiva paŝo pri kunfluiĝo de la du rivalaj mondaj organizaĵoj sub la populara kaj konata firmao de UEA. Tiu internacia organiza unueco estis absolute necesa por nia Movado, por ekstera reprezentiĝo kaj por plua sukcesa evoluo de la landaj kaj fakaj Esperanto-organizaĵoj tra la mondo.

Kompreneble, ankaŭ li ne estis senerara en sia vivo kaj agado. Sed pri tio ni multe kaj aferece diskutis en forumoj de UEA. Nun la funebra etoso postulas de ni ĉiuj sekvi la saĝan antikvan proverbon: “Pri la forpasintoj — aŭ bonon, aŭ nenion!”.

Probal Daŝgupto (Bharato):

Kiam mi aliĝis al la Movado en 1967, Ivo Lapenna jam aspektis parto de la mapo mem de la komunumo, sur kiu ni lokas niajn starpunktojn kaj dezirojn. Kiam mi lernis la elparolon kaj retorikon de lia verkaro kaj de la gramofondiskoj prezentantaj lian hagan festparoladon (1964), lia esto ŝajnis ĉie vejna en la lingvo/kulturo, kun kiu mi konatiĝadis. Sed temis ĉiam pri la **strukturoj**, kiujn li forstrestreĉe konstruis. Montogrimpantoj identigas pintojn kaj ebligas mapojn; sed ni civitanoj devas lerni efike vivi en la valoj; tiun nian kunvivan, personan taskon ni nur nun komencas fronti kun la sama seriozeco, kun kiu la generacio de Lapenna frontis la strukturan taskon de herooj.

Carlo Minnaja (Italio):

La rilato de Ivo Lapenna al la Esperanta parolarto estis unika. Li konceptis la skermadon per vortoj kiel demokrat-sporton, ĉar venkas la plej brila, la plej bone dokumentita, tiu kiu kapablas plaj trafe rebati; sed precipe li estis konvinkita ke multaj antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto estas ŝuldataj al misinformiteco: ili falus antaŭ trafe prezentitaj argumentoj. Lapenna insistis pri kleriĝo precipe ĉe la gejunuloj, al kiuj li transdonis la tradicion de la parolo sentata ne kiel esktera artifiko, sed kiel parto de si mem. La oratoraj konkursoj de li inspiritaj estis la areno kie turniris pluraj estontaj funkciuloj, pretiĝantaj por taskoj de festparolado, debatoj, rondaj tabloj. Lapenna pozitive kritikis, instigis, sed ĉefe kuraĝigis: lia laŭdo estis la pleja repago, la nomo ĉizita sur la transira pokalo "Ivo Lapenna" estis la maksimuma atingo. Ankoraŭ nun, jardekojn post tiuj tempoj, mi sekvas liajn instruojn pri retoriko dum miaj universitataj lekcioj por teni vigla la atenton de la studentoj dum eble teda eksplikado pri matematiko. . .

Edwin de Kock (Sudafriko):

Persone mi havis kun prof. d-ro Ivo Lapenna malmultan kontakton, krom eble per tri leteroj, sed unu el ili mi neniam forgesos. Komencinte mian lernadon de Esperanto en 1955, mi aŭdacis post nuraj tri monatoj skribi en la nova lingvo unuan leteron. . . al li, figuro eminenta, kies laŭdoj tiutempe vivis en preskaŭ ĉies buŝo! Mi kontraŭe estis neniulo. Tamen li respondis, kaj ne seke afereme sed kun kuraĝigo.

Jarojn poste, kiam iuj homoj en la rondo de *Horizonto* ne volis, ke aperu poemo mia pro certaj lingvoformoj laŭ ilia gusto tro eksperimentaj, Ivo Lapenna intervenis miafavore.

Kiel forgesi, kaj kiel ne alporti mian floron funebran?

Mi divenas, ke oni preparos iam ankaŭ memorlibron, omaĝon dignan de granda homo. Mi kuraĝas proponi eĉ titolon: *Ivo Lapenna en Perspektivo*. Pri ĉi-lastaj, ĝi estu verko maksimume pozitiva. Mi ĉiam konsideris tion hontinda kaj tragedio, ke troveblas inter ni — malmultaj strebantoj por unu afero finfine identa — tiom da interbataloj. Tia memorlibro do povus esti bona okazo por etendi al ni reciproke la manojn de paciĝo, kvazaŭ ĉirkaŭ lia cindro.

Ivo Osibov (Jugoslavio):

Kun profesoro Lapenna ligis min kelkaj koincidoj. Ni devenis de la sama urbo, portis la saman antaŭnomon, studis en la sama fakultato, apartenis al la sama profesio, samtempe elektiĝis prezidantoj de la mondaj esperantistaj organizaĵoj — li de UEA, mi de TEJO. De tiam datas nia konatiĝo kaj kunlaboro.

La tiama funkciula ekipo de TEJO plene subtenis lin, precipe ĉar li komprenis la socian rolon de la lingvo kaj konforme al tio volis loki la Esperanto-movadon en la mondo. Li insiste klopodis konvinki kaj la esperantistojn kaj la eksteran publikon ke Esperanto ne estas hobio de stranguloj, sed grava socia kaj kultura faktoro en la internaciaj rilatoj. Kaj li mem tiel kondukis. Li sciis altiri, mobilizi kaj organizi gejunulojn por realigi tiujn celojn.

Aliflanke, li ne pretis akcepti aŭ eĉ konsideri diferencajn starpunktojn de iamaj gejunuloj kiuj kreskis kaj formiĝis sub lia egido, kiuj volis kompreni kaj esprimi novajn ŝanĝiĝantajn cirkonstancojn. Tio gvidis al lia nereelektio. Sed la lasta jardeko ne povos superombri liajn grandegajn meritojn dum la antaŭaj kvar jardekoj.

Yukiko Isobe (Japanio):

Mi konatiĝis kun d-ro Lapenna en 1964 okaze de la 49a UK en Hago, kie mi salutis nome de JEI. Li afable alpaŝis al mi tuj poste por kuraĝigi min en la preparlaboroj por sekvontjara 50a UK en Tokio. Dum nia interparolo li donis al mi plurajn sugestojn kiuj montriĝis poste utilaj: aparte en la informado, la kampo en kiu li akiris tiom da famo. Poste daŭris inter li kaj mi amikaj korespondado kaj interparoloj ĉe UK-oj.

La lasta renkontiĝo kun d-ro Lapenna fariĝis por mi la 59a UK en Hamburgo. Tie post lia adiaŭa saluto en la inaŭguro de kelkaj japanaj kongresanoj invitis lin al modesta bankedo, por dankesprimi pri liaj meritplenaj laborado kaj gvidado en la internacia Esperanto-movado. Mi preĝas por ripozo de lia animo.

Karaj geamikoj en la tuta mondo,

Okaze de la forpaso de mia kara edzo, Prof. D-ro Ivo Lapenna, mi ricevis amasegon da floroj, telegramoj, leteroj kaj karto de personoj, kies adresojn mi ne scias. Pro tio, bedaŭrinde, mi ne povas danki al ili unuope, kiel mi dezirus, sed faras tion pere de tiuj ĉi kelkaj vortoj en la revuo *Esperanto*.

Estas por mi granda konsolo konstati, kiom da personoj en ĉiuj landoj de la mondo vere ŝatis kaj estimis mian edzon.

Koran dankon pro via partopreno en mia senfina malfeliĉo.

S-ino Birthe Lapenna

Rekorda partopreno en Novjorko

“Lingvo kaj kulturo en internaciaj organizaĵoj” estis la temo de la Sesa Konferenco pri Lingvo kaj Komunikado, kiu okazis en Novjorko la 11-an de decembro 1987. Ĉi-foje aparte elstaris la nombro de partoprenantoj: Pli ol cent homoj ĉeestis ĉi tiun komunan aranĝon de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingva Problemo (CED) kaj la Traduka Fakto de Unuiĝintaj Nacioj. Partoprenis ne nur la Ĝenerala Subsekretario de UN pri Specialaj Politikaj Aferoj, s-ro Diego Cordobéz, sed ankaŭ lia antaŭulo Kavaliro Brian Urquhart, tre bone konata pro siaj pacigaj intervenoj en politikaj krizoj tra la pasintaj kvardek jaroj. Partoprenis ankaŭ du iamaj Asistaj Ĝeneraj Sekretarioj, s-roj George Sherry kaj Robert Muller.

La konferenco dividiĝis en kvin sesiojn, sub la temoj: Komunikado kaj kulturo en UN, Komunikado trans kulturoj, Internacia administrado, Internaciaj intertraktadoj kaj Internacia komerco. Enkondukis ĝin s-ino Françoise Cestac, direktoro de la Traduka Fakto de UN, kaj d-ro Alvino Fantini, profesoro pri lingvo-instruado en la Kolegio por Internacia Trejnado. D-ro Fantini, kiu siatempe aŭtoris sonbendan kurson pri Esperanto por usonaj lernantoj, brile parolis pri la rolo de la lingvoj en la socio kaj kvazaŭ pretigis por la partoprenantoj kelkajn traktindajn demandojn por la cetero de la konferenco.

La spaco permesas elstarigi nur kelkajn el la plej interesaj respondoj al tiuj demandoj. En la sesio pri internacia administrado, la ĉefparolanto estis s-ro Kati Annan,

Asista Ĝenerala Sekretario de UN pri Homrimeda Mastrumado, kiu evidente havas unikajn kvalifikojn por pritrakti la konceptojn de organizado, kiujn homoj el diversaj mondopartoj alportas al UN. Multaj konceptas UN kiel “familian” organizaĵon, kie regas reciproka helpo kaj subteno; aliaj konsideras ĝin esence praktika ilo por atingi difinitan celon. Kelkaj traktas ĝin kiel hierarkian sistemon, dum aliaj konsideras sin ano de teamo. Eĉ la plej elementaj aferoj (ĉu uzi personajn aŭ familiajn nomojn, kiam manpremi la kolegojn, kiel alrigardi ilin, kiel labori en ambaŭseksa medio) povas kaŭzi miskomprenojn. “Ĉu ni kapablas krei komunan lingvon de adminstra stilo ĉe UN?” demandis s-ro Annan.

Ankaŭ aparte interesa estis la sesio pri internaciaj intertraktadoj. S-ro Cordobéz atentigis, ke la lingvo povas helpi aŭ malhelpi en tiaj intertraktoj. Oni povas ĝin uzi por eviti interkonsenton aŭ por atingi ĝin. En tiu rilato la ambigueco ofte ludas gravan rolon en la atingo de interkonsentoj. Ekzemplojn donis s-ino Annick de Marffy, fakulo de UN pri la juro de la maro, el sia sperto kiel intertraktanto pri lingvaj demandoj inter la diversaj partioj je la Traktato pri la Juro de la Maro. Kaj s-ro Russell da Silva, advokato kiu specialistas pri internaciaj financaj negocjoj (kaj mem uzas ses lingvojn tiucele) malfermis al la ĉeestantoj tutan mondon de lingvaj problemoj, ekzemple la nego-

La Prezidanto de UEA transdonas la Premion Zamenhof 1987 al la UNICEF-direktoro James Grant.



Foto: UNICEF/Lily Solmssen

cadon en unu lingvo pri kontrakto en alia lingvo, kaj la problemon de jure egalrajtaj tradukoj de difinita kontrakto.

Esperanto rolis relative malforte en la konferenco ĉi-foje. Ĝi ja ofte menciigis, kaj estis serioze traktata de la partoprenantoj, sed mankis referaĵo speciale pri tiu temo. Aliflanke, multaj konferencanoj ĉeestis la akcepton de UEA tuj post la konferenco mem, kaj tie havis okazon vidi ekspozicion de Esperantaj libroj kaj aŭdi la lingvon. Temis pri la ĉiujara akcepto okaze de Zamenhof-Tago, kiun organizas la Novjorka Laborgrupo de UEA ĉe 777 United Nations Plaza. La festo ĉi-foje havis apartan intereson, ĉar ĝi estis okazo transdoni la Premion Zamenhof 1987 al s-ro James P. Grant, Direktoro de la Infan-Fonduso de UN (UNICEF) (vd. p.1 en la januara numero).

S-ro Grant, kiel atentigis d-ro Humphrey Tonkin en siaj rimarkoj okaze de la transdono, sukcesis stiri UNICEF in-

ter la rokoj de politika konflikto kaj lanĉi internacian agadon, kiu atingas eĉ plimulton de la monda infanaro. Li aparte laŭdis la grandan imunigan kampanjon kiun lanĉis UNICEF, kaj la projekton pri perbuŝa rehumidigo kiu savis la vivon de milionoj da infanoj, precipe en Afriko. Akceptante la premion, s-ro Grant laŭdis la laboron de UEA por antaŭenigi la internacian kompreniĝon. "Niaj titoloj mem havas komunan trajton," li asertis: "Esperanto kaj UNICEF havas saman signifon: Espero." Aldonis siajn rimarkojn ankaŭ la unua ricevinto de la Premio, s-ro Muller: "S-ro Grant kaj mi estas en plej bona senco konkurantoj," li diris, "nome en kreo de pli bona, pli paca mondo."

En posta neformala interpretado, s-ro Grant kaj d-ro Tonkin diskutis pri la kunlabora agado inter UEA kaj UNICEF. Oni interalie antaŭvidas aperigi version de la jarraporto *Stato de la monda infanaro* ankaŭ en Esperanto.

MOVADAJ NOVAĴOJ

Tiel amasiĝis la raportoj pri notindaj okazaĵoj de post decembro, ke ni ne povis dediĉi al ĉiu el ili la laŭmeritan paĝamplekson. Jen tamen la ĉefaj detaloj pri la plej elstaraj.

Eksterordinara eldono en Irano

La jena raporto estas ĉerpita el letero de M.H. Saheb-Zamani al G. Waringhien.

"Okaze de la Semajno de la Unua Internacia Libro-Ekspozicio en Teherano, 6-13a de novembro 1987, la Ministerio de Informado urĝe proponis al s-ro M. Ramezani, eldonisto kaj mia bona konato, tujan eldonon de [la Robaĵoj de Omar] Kajjamo, multlingve, por la ekspozicio. La tempo por li disponebla estis tre streĉa — nur tri semajnojn ĝis la malfermo de la ekspozicio! Kvin tagojn antaŭ la malfermo, s-ro Ramezani sciigis min pri la afero. Mi proponis, ke li enmetu ankaŭ la Esperantan version de la robajoj. Fine, kvazaŭ mirakle, la libro eldoniĝis ĝustatempe, en 712 paĝoj kaj 30 lingvoj, kun sepkoloraj iraneskaj ornamaĵoj ĉe la margenoj, en 10 000 ekzempleroj! Normale la procezo eldoni tian verkon daŭras du jarojn en nuntempa Irano.

"En la libro troviĝas 210 el viaj belaj robajoj, inkluzive de parto de via enkonduko. Feliĉe, ni povis eldonigi ankaŭ la emblemon de la Centjara Jubileo de Esperanto. . . kaj vian foton [la sola krom tiu de Fitzgerald, la angla tradukinto]. . . Vi iam esprimis la deziron, ke viaj robajoj havu miniaturojn. Inter la Esperantaj robajoj troviĝas du koloraj kaj ses nigroblankaj miniaturoj, el entute 86. . . La enkondukaj vortoj de la eldonisto aperas kvarlingve: perse, arabe, Esperante kaj angle.

"En la ekspozicio oni nekredeble bonvenigis la eldonon de Kajjamo, kaj oni jam parolas pri ĝia baldaŭa elĉerpiĝo — kvankam, Iran-norme, ĝi estas — tre multekosta. . . Dum la lastaj jaroj ĝis nun, neniuj rajtis eldoni aŭ vendi la Robaĵojn de Kajjamo. Ankaŭ Esperanto, per si mem, havas problemojn en nia medio. Tamen Kajjamo, Esperanto kaj la Centjara Jubileo ensemble ekfariĝis subite la krono de la libro-publikigado. . .

"Cetere, la nura kompostado, presado, bindado kaj publikigado, dum malpli ol tri semajnoj, en iu tre revolucibatita lando post okjara milito kaj neimagebla inflacio, manko de papero kaj malabundeco de multaj aliaj necesaĵoj, estas pruvo de senlima, kaŝa, fortega, potencialo malantaŭ la fasado de la Tria Mondo, pri kiu mi ade atentigis mian kolegaron en Oriento, en Okcidento!"

La 1-an de decembro la tutlanda kanalo de la irana televido dediĉis parton de la programo "30-Demanda Konkurso" al tiu libro, emfazante precipe la Esperantan sekcion.

Planlingvoj fakule en Sovetunio

"Planlingvoj: resumo kaj perspektivoj" — jen la temo de scienca konferenco de la 22a ĝis la 24a de oktobro 1987 en Tartu, Estona SSR. La tartua universitato jam famiĝis inter esperantologoj pro la libroserio "Interlingvistika Tartuensis", kies redaktoro, prof. Aleksandr Duliĉenko, kunvenigis pli ol kvindek fakulojn en ĉi tiu unua sovetia konferenco pri planlingvoj.

Partoprenis interalie la eminenta lingvisto prof. Paul Ariste, proksima kolego de prof. Duliĉenko kaj membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. El Moskvo ĉeestis la konataj interlingvistoj d-ro Sergej Kuznecov kaj prof. Olga Aleksandrova. La prelegoj traktis tre diversajn temojn: ĝeneralan interlingvistikon la unuan kaj trian tagojn, specife Esperanton dum la dua, en kadro plej trafe resumita de prof. Duliĉenko. Maturiĝis la tempo, laŭ li, por ke ankoraŭ multaj lingvistoj reviziu sian skeptikecon rilate la "artajn" aŭ planlingvojn. "Ne povas ekzisti limoj inter ilia funkciado kaj la funkciado de etnaj lingvoj." Pro tio, celkonformus organizi similan konferencon ĉiun duan aŭ trian jaron.

La prelegoj de la konferenco aperos en “Interlinguistica Tartuensis VI” (1989); la kvara volumo aperis tuj antaŭ la konferenco, dum la kvina — dediĉita al la centjariĝo de Esperanto — baldaŭ aperos. La estona eldonejo “Valgus” (Lumo) publikigos en 1988 400-paĝan monografion de prof. Duliĉenko, *Meĵunarodnie vspomagateljnje jaziki* (Internaciaj helplingvoj), kiu pritraktos ilian historion ekde “laabela turo” ĝis la nuntempo.

N. Laanoja

Esperanto ĉe la Vintraj Olimpikoj!

Esperantistoj en la kanada urbo Kalgario, kie okazas dum februaro 1988 la Vintraj Olimpiaj Ludoj, sukcesis realigi kvinjaran projekton pri la tiea uzo de Esperanto. Jam en 1972 (Munkeno) kaj 1976 (Montrealo), atletoj en la Someraj Olimpikoj disponis pri frazaro en Esperanto kune kun aro da aliaj lingvoj.* Tiun libreton (“*Saluton, amiko!*”) la kalgarianoj nun reviziis kaj ampleksigis, konvene al kaj la vintraj kaj la someraj Ludoj. En tiu projekto aparte utilis la terminaroj de hungaro Tibor Ujlaky-Nagy (*La sporta lingvo en Esperanto*, 1972) kaj kanadano Rüdiger Eichholz (*Esperanta Bildvortaro*, nun eldonata); kunlaboris tamen ne nur esperantistoj, sed ankaŭ anoj de la diversaj nacioj loĝantoj en Kalgario.

La fina rezulto estas 120-paĝa libreto, fakte iom pli granda ol normala poŝo, kiu enhavas pli ol du mil sportajn (kaj turismajn) terminojn kaj esprimojn en Esperanto kaj la du oficialaj lingvoj de la Olimpikoj (la franca kaj angla). Al la 5 000 ekzempleroj volontuloj algluis sliparon en kvara lingvo, tiel altigante la nombron de lingvoj ĝis tridek**. Tiu ĉi eldono, same titolita “*Saluton, amiko!*”, estas ne nur pli ampleksa ol ĝiaj antaŭintoj sed ankaŭ pli belaspekta, dum la tradukoj impresas ĝenerale tre trafe. Eĉ se oni rajtas iom dubi, kiomgrade la atletoj povus konversacii per ĝi, estas tute ne dubinde ke la libreto estas

taŭga varbilo pri la ĉiuflankeco kaj natureco de Esperanto. (Notindas ankaŭ, ke la kompilintoj zorgis pri amikeca etoso en la troveblaj esprimoj: eta kontribuo al internacia harmonio?)



La kalgariaj esperantistoj faris grandajn klopodojn por altiri la apogon de la organizantoj de la Ludoj. Juan Antonio Samaranch, prezidanto de la Internacia Olimpika Asocio, Frank King, estro de la Kalgaria Organiza Komitato, kaj Bill Warren, la ĉefa advokato por la Vintraj Ludoj, ĉiuj montriĝis helpemaj. Post longaj intertraktoj, Kanada Esperanto-Asocio kaj la Kanada Olimpika Asocio ne nur subskribis kontrakton pri uzo de la oficialaj “piktogramoj” por ornamo la libron, sed la organizantoj konsentis aranĝi disdonadon al ĉiuj partoprenantaj teamoj. La koston de la eldono — 27 000 kanadajn dolarojn — pagos la esperantistoj mem.

La ideo tamen ne estas, ke tiu ĉi eldono servu nur por Kalgario. Ĝi estas celita por ĝenerala uzo ĉe iu ajn internacia sportfestivalo, kaj aparte por estontaj Olimpikoj. Fotorepreso de la diverslingvaj eldonoj estus facila: la sola antaŭkondiĉo estas permeso de la Kanada Olimpika Asocio por la piktograma reprodukto. Tion devas peti landa aŭ internacia Esperanto-asocio, ne nura loka grupo. Por pliaj detaloj kontaktu Dorothy Hawley, 3019 Hampton Crescent, Calgary, Alberta T3E 4R1, Kanado.

* La origina iniciato venis de Ralph Harry, eksa aŭstralia ambasadoro kaj membro de la Honora Patrona Komitato de UEA.

** Tio estas: la afgana, araba, bulgara, ĉeĥa, ĉina, dana, finna, germana, hinda, hispana, hungara, islanda, itala, japana, korea, nederlanda, nepala, norvega, persa, pola, punjaba, rumana, rusa, serbokroata, sveda, taja, turka, urdua, kaj vjetnama (plus mistera trideka lingvo — red.). Laŭ la kalgarianoj, inter la lingvoj de la nacioj, kiuj partoprenas la Somerajn Olimpikojn, mankas nur la bengala, birma, filipina, indonezia, laosa, malaja, portugala, sinhala, svahila kaj tibeta.

Kial ridetas la kalgariaj esperantistoj? Kvin jaroj da laboro alportis sukceson, en la formo de 33-lingva manlibro por la olimpikaj atletoj. Ĉu koreoj povos profiti de tio?



Teknika kunsido de la Estraro de UEA, 9-10 januaro 1988

Estraranoj Tonkin, Szabó-Felső kaj Masterman venis januare al la sidejo en Roterdamo por pritrakti administrajn kaj financajn aferojn kun la du direktoroj, Milojević kaj Salvesen. Pro tio, ke ne temis pri formala plenkunsido, ĉiuj decidoj atendas la voĉdonon de aliaj estraranoj: sed ni povas jam raporti pri kelkaj evoluoj.

Gian Carlo Fighiera, elektita estrarano pri financoj en Varsovio, komunikis sian decidon eksiĝi el la Estraro kaj Komitato en letero al la Prezidanto. Kiel motivon li citis la rezolucion akceptitan de la Komitato okaze de lia elekto (vd. *Esperanto* 1987/p.164), kiun laŭ li la Estraro malobservas: temas pri decentrigo for de la Oficejo de pluraj taskoj, kiel eldonado, administrado de la UK, eĉ la Libroservo. Tiun leteron la Komitato ricevis, kune kun letero de la Prezidanto kiu respondas al tiu kritiko. Tonkin atentigas, ke partojn de la rezolucio oni ja sekvas (ekzemple pri sendependigo de GCA kaj dungo de nova KKS), dum aliaj postulas antaŭpreparon aŭ pli ĝeneralajn kaj drastajn ŝanĝojn en la administrado, kiuj ne nepre estas enkondukindaj. La ĉeestantaj estraranoj rekomendis akcepton de la eksiĝo al la plena Estraro, kvankam formale tio ne okazis kiam ni tajpas ĉi tiun vortojn.

Koncerne la sendependigon de Grafika Centro Antverpeno, UEA venis al provizora interkonsento kun Flandra Esperanto-Ligo por ĝia vendo el FEL, kiu jure efektiviĝis la 1-an de januaro. GCA tial malaperos el la internaj financoj de la Asocio, kvankam UEA kompreneble restos ĝia kliento por multaj grafikaj servoj.

Tonkin kaj Milojević vizitis Pollandon en februaro por kunsidoj rilate al la Bjalistoka Centro. El reagoj ricevitaĵoj, Tonkin ellaboras proponon flanke de UEA pri ĝiaj celoj kaj strukturo: Ĝenerale oni antaŭvidas multifunkcian, multcelan konstruaĵon, direktitan kaj al la pola movado kaj al la internaciaj Esperanto-organizaĵoj kaj esperantologoj. Pliajn detalojn ni aperigos, kiam eblos.

La evoluantajn planojn por la 73a UK, la Azia Centro de UEA kaj pri la Asociaj financoj ni lasos por pli ampleksa traktado post la marta estrarkunsido.

La Centra Oficejo sincere dankas pro la multaj novjaraj bondeziroj, kiujn ni ricevis, kaj deziras al ĉiuj feliĉan kaj sukcesan 1988.

Esperanto-rubriko en 12-lingva revuo

El Taŝkento, Sovetunio, venis antaŭnelonge jena letero: “En Uzbekio okazis senprecedenca afero: la redakcio de la revuo *Sovetskij Uzbekistan* konsentis ekaperigi Esperantan rubrikon. Al esperantistoj estas disponigita duonpaĝo en ĉiu numero. Se la legantoj esperantistoj estos aktivaj kaj al la redakcio venados multaj pozitivaj leteroj, la rubriko povos estis pligrandigita. . . En la rubriko aperados en Esperanto kurantaj informoj pri la nuntempa kaj antikva Uzbekio, respondoj al la leteroj, la leteroj mem de la legantoj, literaturaĵoj. . . La revuo aperas en 12 lingvoj (uzbeka, rusa, araba, daria, germana, persa, angla, urdua, hispana k.a.) kaj estas emisiata en- kaj eksterlanden.

“La leteroj estu oftaj, oni interesiĝu pri abonebleco, petu provekzempleron, demandu pri la vivo en Uzbekio, pri ties loĝantaro, kulturo, industrio, tradicioj, naturo ktp, pri la eblecoj kaj atingoj de nia lingvo Esperanto. La redaktoro ne estas esperantisto, sed al li plaĉas la ideo kaj vervemo de la esperantistoj. Ni klopodis certigi lin pri nia solidareco, ke la esperantistoj estas scivolemaj kaj socie aktivaj homoj.

“Ni petas vin skribi al: “Sovetskij Uzbekistan”, Leninstr. 41, SU-700 000 Taŝkento. Bonvolu skribi en Esperanto aŭ en unu el la lingvoj de la revuo. Dankon!

“Vin salutas kore esperantistoj de Uzbekio.”

Represo de ĉi tiu alvoko en aliaj revuoj estus bonvena.

1988 “Jaro de Grabowski”

La inundo de jubileoj heroldita pasintnumere (p.2) jam ekis. Pola Esperanto-Asocio definitivigis, komence de januaro, sian projekton nomi 1988 “La Jaro de Grabowski”, pro la jenaj kialoj:

* *La neĝa blovado* (Puŝkin) fariĝis en 1888 la unua literatura libro en Esperanto, tradukita de Antoni Grabowski.

* Antaŭ 80 jaroj fondiĝis Pola Esperanto-Asocio, kun Antoni Grabowski kiel sia unua prezidanto.

* Same en 1908 fondiĝis la Akademio de Esperanto, kaj la unua direktoro de ĝia Gramatika Sekcio fariĝis Antoni Grabowski.

* Antaŭ 75 jaroj aperis la unua poezia antologio en Esperanto, *El Parnaso de popoloj*, tradukita el 29 naciaj lingvoj de Antoni Grabowski.

* La ĉefverko de Grabowski, majstra traduko de la pola epopeo *Sinjoro Tadeo* (Mickiewicz), eldoniĝis en 1918, do ĝuste antaŭ 70 jaroj.

Honore al la Jaro, PEA reeldonas la supre menciitajn verkojn de Grabowski, plus la operon *Halka* kaj eventuale aliajn. Ĝi lanĉos diversajn kulturajn konkursojn por esperantistoj kaj lernejoj. Kaj ĝi ligos la temon Grabowski kun Esperanto-aranĝoj tra la jaro, aparte kun du kulturaj forumoj:

Forumo de la Esperanto-Kulturo, 10-12 junio en Varsovio, kun eksterlandaj kaj neesperantistaj gastoj kaj riĉa arta programo;

1-a Lernejo de la Pola Kulturo, 13-27 julio en Toruń: unika okazo sperti en Esperanto aranĝon jam faman en naciaj lingvoj.

Por pliaj detaloj pri la Jaro skribu al respondeculo Jarek Parzyszek, p/a PEA, ul. Jasna 6, PL-00-013 Warszawa 1.

Celade al nova filmepoko. . .

Ni raportis en novembro pasintjare pri la planoj de hungara reĝisoro István Vajda voĉsinkronigi ("dubli") famajn filmojn en Esperanto (laŭ la sukcesa modelo de *En Eŭropo ie*), se troveblis sufiĉe da subteno. Laŭ lastatempa letero lia, la afero progresas:

"Amase venis leteroj kun interesiĝo el multaj landoj . . . do mi konsideras, ke la komencita afero ne estas senespera. Mi sukcese konkursis por la stipendio de la Fonduso József Eötvös de Hungara Kultura Ministerio. Mia celo estas prepari la Esperantan dublaĵon de la Oskar-premiita filmo *Mefisto*, reĝisorita de István Szabó laŭ la romano de Heinrich Mann. La esperantigitan filmon mi volas prezenti kadre de la UK en Roterdamo. La sumo de la stipendio estas sufiĉe malgranda (ĝi kovras ĉ. unu sesonon de la kostoj), tial ni serĉas pliajn subvenciantojn en Hungario. . . Se la aferoj evoluos bone, ni povos porti al Roterdamo eventuale ankaŭ tutvesperan desegnofilmon *Blanka ĉevalido* de Marcell Jankovich. . .

"Nia fina celo estas produkti filmotekon por la esperantistaro. Mi opinias, ke la esperantlingva paroligo de tiuj filmverkoj, kaj kadre de tio la uzado de Esperanto en dramaj situacioj, estas digna paŝo por realigi la centjaran zamenhofan ideon en nia epoko. Ni kalkulas je la helpo ne nur de unuopuloj, sed ankaŭ je tiu de esperantistaj komunumoj, grupoj, asocioj kaj universitataj bibliotekoj, ja ili per la aĉeto de la videokasedoj povus certigi altkvalitajn, humanismajn programerojn en siaj renkontiĝoj, kunvenoj, lingvokursoj kaj konferencoj. Pro la nekontentigaj financaj cirkonstancoj, por realigi la celon ni volonte akceptus ĉiujn subtenojn, donacojn, kontribuojn. . . Pri la evoluo de nia laboro ni daŭre raportos al la Estraro de UEA kaj al la legantoj de Esperanto.


"Kun amikaj salutoj, ĝis la dumkongresaj premieroj,
István Vajda"
(reagoj al HEA, Pf. 193, H-1368 Budapest)

Unika ŝanco ekkoni la japanan kulturon

De la 11-a ĝis la 26a de majo 1988 okazos "Kultura seminario por esperantistoj" ĉe la Oomoto-Lernejo de Tradiciaj Japanaj Artoj, lokita en la urbo Kameoka. Tiuj du semajnoj kostos al la (ĝis ok) partoprenantoj po mil usonajn dolarojn: la kutime japanlingvajn kursojn oni interpretos en Esperanton, tiel donante al esperantistoj vere unikan ŝancon deproksime ekkoni la japanan kulturon.

La kursoj ampleksas ĉanojn (la japanan teceremonion), utajon (ĉantadon de tekstoj el la no-teatro), kaligrafion, tuĉpentradon (t.e. per inko), potfaradon, skermarton, akupunkturajn kaj aliajn kulturajn temojn. La partoprenantoj disponos pri la konstruaĵoj kaj ekipaĵoj de la Oomoto-Centro.

Kandidatoj sendu sian foton kaj mane skribitan aŭtobiografian skizon (inkluzive la ĉefan celon de sia partopreno) al Internacia Fako de Oomoto, Kameoka-si, Kyotuhu, 621 Japanio, kiel eble plej baldaŭ.



Terminologo tra Eŭropo

En 1987 Rüdiger Eichholz, la konata kanada terminologo kiu aktuale aperigas Esperantan version de la Duden-bildvortaro, ricevis subvencion de la nederlanda firmao BSO por evoluigi sian Pekoteko-sistemon (skizitan en *Esperanto* 1986/p.210: temas pri metodo internacie kunlabori en la kreo de teknikaj terminaroj). Per tiu mono li decidis fari unu-monatan rondvojaĝon tra kelkaj eŭropaj landoj por varbi pliajn kunlaborantojn. La komencon konsistigis la 1-a Internacia Kongreso pri Terminologio kaj Sciiko (fine de septembro en Trier, FR Germanio), kie s-ro Eichholz prezentis referaĵon pri la Esperanta terminologio, kaj la finon markis la viena simpozio "Esperanto 100-jara" en la lastaj tagoj de oktobro. Intere li vizitis aron da esperantistoj kaj komputistoj, precipe en FRG kaj Francio.

Laŭ la raporto de s-ro Eichholz, la vojaĝo estis tre fruktodona. Interalie li ĝisdatigis siajn sciojn koncerne la plej lastajn atingojn en aŭtomata informtraktado kaj la programarojn kaj faklibrojn haveblajn en Eŭropo. Aparte utila estis la okazo kunsidi en Berlino kun estraranoj de Terminologia Esperanto-Centro, la UEA-institucio starigita en la 72a UK. Tie eblis solvi kelkajn malinterkonsentojn kiuj ekestis dum la lastaj du jaroj, kaj plue ellabori sistemon por kunlabori en Pekoteko (pere de teksta kopiado kaj dissendo) homojn el socialismaj landoj, kie la necesaj IBM-kongruaj komputiloj estas preskaŭ nehaveblaj. Detala raporto kaj terminologiaj konsiloj riceveblas ĉe Balieboro, Ontario K0L 1B0, Kanado.

La redakcio bonvenigas viajn reagojn al temoj lanĉitaj en niaj paĝoj. Bv. skribi koncize kaj klare, prefere kun spacoj inter la linioj. Ni rezervas la rajton mallongigi leterojn por aperigo. Spaco malpermesas, ke ni publikigu ĉiujn — sed ĉiuj estas nepre bonvenaj!

Pri la Infana Kongreseto

Bedaŭrinde mi ne povis partopreni la 72an UK. Tamen mi volas gratulis-ron Christopher Fettes (*Esperanto* 1987/p. 173) pri lia zorgemo rilate al la signifo de la infanoj en la Esperanto-movado. Ĉu la infanoj ne estas servataj neglekte pli ĝenerale ol nur je la kongresoj?

Carlos de Faria (Brazilo)

Laŭ mia propono oni devas nomi en la Centra Oficejo estron por la IK en Roterdamo. Tiu ĉi devus eltrovi grupon de ses volontuloj, kiuj loĝas en la regiono de Norda Eŭropo: ju pli internacia ĝi estos, des pli bone ĝi restos. La tuta grupo en siaj landoj devus varbi volontulojn, prefere inter gepatroj, kiuj ankaŭ povus esti instruistoj. Mi havas la esperon, ke venontjare la kongreseto estos “antaŭ la nazo” de UEA kaj tiamaniere ĝi bone sukcesos.

Adamo Goralski Pawlikowski (Kanariaj Insuloj, Hispanio)

Red.: *Jam estas planoj nomi ekster-oficejan komisiiton pri la IK-oj, kiu kunlaboros kun la surlokaj organizantoj. Tio fakte ŝajnas al mi pli saĝa, ol doni plian taskon al la oficistoj!*

Interreligia rekontiĝo en la 73a UK

Mia edzino kaj mi partoprenis kaj parolis ĉe IRKE (Interreligia Kunveno de Esperantistoj) dum la UK-oj en 1969, '70 kaj '74, iniciatitaj ĉefe de Jozef Eder kaj Oomoto. . . La lastajn jarojn ne plu okazis IRKE; ekzemple en Varsovio ne estis eble viziti la kunvenojn de ĉiuj religioj, filozofioj kaj homaranistoj, ĉar ili ofte okazis samtempe en diversaj salonoj.

Tial mi proponas denove organizi IRKE en Roterdamo, por en la spirito de Zamenhof strebi al interkompreniĝo, vidante la komunan ideon kaj havante la volon aŭskulti unu la alian. Mi proponas kiel temon: Kiel la homoj povas fariĝi pacemaj (kom-

preneble ĉiu rajtas proponi alian temon). Sendu, se eble, kopiojn de viaj prelegetoj antaŭ la 1-a de marto, por ke ni povu bone dividi la disponatan temon. Mi ankaŭ pensas pri ekspozicio, pri kiu proponoj estus bonvenaj.

**Wim Koopmans
Schalkeroord 405
NL-3079 WH Rotterdam**

Ne tute racia rezonado?

En la januara “reagoj” mi surprizite legis, kaj relegis, la leteron de d-ro Gunther pri la bjalistoka centro.

1. Mi ne komprenas, kial starigo de nova centro kontribuas al detruo de nia planedo? Ĉu sekve, ni devus tuj postuli ĉesigon de naskado. . .?
2. Ĉiam “centro” situas malcentre por iuj! Ekzemple, la UEA-domo en Roterdamo kaj la Kultura Centro Esperantista en La-Chaux-de-Fonds estas tute malcentraj por milionoj da homoj. . .
3. Pluraj centroj en diversaj landoj kaj kontinentoj povus stimuli pli bonan agadon; tamen estus preferinde specialigi ilin por ke ili ne iĝu rektaj konkurantoj.
4. Mi konsentas ke tia centro en Pollando laboru sendepende kaj sencensure.
5. Pri “kulturo” mi diros nenion ĉar, antaŭe, endus akordiĝi pri la sencoj de tiu vorto.

Germain Pirlot (Belgio)

Mi ja nenion komprenis en la metafizika slango de s-ro Gunther. Tial mi varme gratulas la redaktiston, kiu sukcesis traduki la reston de lia letero al komprenebla Esperanto.

Bernard Aunis (Francio)

Korespondaĵo koboldologia

Preseraro sur p.6 de la januara *Esperanto* povus eventuale krei konfuzon. La aludo en *Korespondaĵo ludovikologia* al mia traduko troveblas, ne kiel presite: sur p.225, sed sur p.255.

William Auld (Skotlando)

Ni kuraĝu herezajon!

Estas kelkaj momentoj antaŭ la komenco. . . Subite eksonas el la megafonoj blovorkestro kaj ĥoro: “En la mondon . . .” La kongresanaro ekstaras, aŭskultas, iuj flustre kunkantas — sed ne longe; ili baldaŭ unu post la alia ĉesas, embarasite rigardante antaŭ si. Kaj mi subite sentas, kvazaŭ mi surhavis soldatan uniformon, pezajn soldatsuegojn, soldatan dorsosakon, sur la ŝultro fusilon kaj tiel malpace ekipita marŝas instrui al la mondo, kiel ĝi interfratiĝe faru unu feliĉan rondon familian.

Terura sento! Sed kiu kulpas? Zamenhof certe ne — ja li verkis nur la tekston, kiu malgraŭ sia centjareco kaj do ioma arkaikeco enhava kaj lingva estas senriproĉa, noble ekzalta. Verŝajne kulpas tiuj, kiuj el la pluraj proponitaj melodioj por *La Espero* elektis ĝuste tiun ĉi. La ritmo de milita marŝo estas nekonforma al la zamenhofa teksto, mi eĉ dirus tute nekongrua kun ĝia spirito. Al muzikistoj kaj trejnitaj kantistoj la melodio ne prezentas problemojn, sed tute certe ja al plimulto de la kantantoj el la verda popolo: la tonsaltoj estas tro grandaj kaj la distanco inter la plej alta kaj la plej malalta sonoj estas ekscesa; ĝi ne permesas al la kantanto preni spiron; kaj mi dirus ankaŭ, ke la nuna melodio de nia himno ne estas sufiĉe majesta.

Ni do likvidu la multjaran paradokson — himno de pacbatalantoj kun melodio en ritmo de milita marŝo — kaj havigu al nia himno novan melodion! Ja pluraj koheraj nacioj ŝanĝis komplete sian himnon kiam la malnova ne plu taŭgis, do kial ne kuraĝu fari tion ni? Des pli, ke la melodio fakte neniam estis oficialigita. Povus esti aranĝita internacia konkurso kaj el la prezentitaj konkursaĵoj kompetenta komisiono elektu la plej taŭgan; en ĉi tiu afero povus (eĉ devus) ludi grandan rolon Muzika Esperanto-Ligo.

Eduard V. Tvarožek (Ĉeĥoslovakio)

Brila gerila malmilito

Flugilhava ŝtono (1973), Jiří Karen (1920). El la ĉeĥa trad. Jiří Kořínek. Chapecó: Fonto, 1985. 238p. Ilus. 21cm. Fonto-serio 5. Prezo: 24,00 gld.

Jiří Karen, en *Poemo por la pentristo*, petas pentri "moneron de luno/ super arbaro". Dume, li mem alparolas alian lunon, kiu "en la libro mallumo/ enpensiĝe/ legas la fiŝlagon". Temas pri la *Fiŝlagoj en la Sudo*, "silentaj/ plenaj de kisoj de pluvo", al kiu eĥas tuta diverso da pluvoj: "rememoru ankoraŭ la lekcionojn de griloj/ Pluvigis sur la amon Sur salikon/ Sur la proksimegan poplon/ Sur la forajn picarojn" (*Unua amo*); *Poemo por la paĉjo*, tiu kiu instruis vivi honeste, rakontas, ke "Sur lian honestan ŝuistmetion/ pluvadis"; *Kaj la instruistoj?* pensas al "Sinjoro instruisto Doleček/ matematiko pluva", krevigante la patoson per la luda parentejaĵo, ke "(Pluvon inventis germana monaĥo/ Li faradis per ĝi miraklajn ĵonglaĵojn)".

Eble la pluvo "simbolas" grizan sorton. Sufiĉe grizan sorton pripentras tiu ĉi liberversa epopeo. Eĉ *Rerigardo* al la infanaĝo rimarkas severan vipon, kiu "nubmienas super bubaj petolaĵoj". *Kiel vi vivis en la fiŝist-kabano* rakontas, ke "Ni iradis 'laŭorde'/ survange ruzetan rideton de orfoj". Kiam tiuj orfaj buboj reaperas, maturaj, *Sur la planedo de profito*, "Ili sciis:/ ĉi tie devas esti ĉiu/ al si mem alaŭdo".

Tiaj bilderoj skulptas al ni ŝtonecon nedubeble tutmondan ("Al ŝtonoj vi predikos vane/ evangelion de via tereno", *Kion al vi aŭguris ciganino*), eĉ ekaspirantan al



univers-amplekso — *Sur la planedo de ŝtonoj*, poemo pri la surluniĝo de 1969, atestas, "kiel ni ŝteliĝas/ forlasas la epokon de ŝtono/ kaj la ŝtono de l'epoko/ enfrotiĝas sub mian haŭton". La enfrotiĝo eble apogeas post 1969, sed jam ŝiris la memon dum kaj en la dua mondmilito (*Sufoka nokto; Somera tempesto; Militŝtormo estas jam ĉi tie; Flugatako* — "Kvazaŭ ni mortigante/ povus preventi/ propran morton....", "Grenadoj [...]/ homojn serĉadis/ kiel infano/ internan mekanismon/ de ludilo").

"Ĉi tiu povas fine fari la poeto/ kontraŭ militon", vortas

Tago afabla je vortoj, "ol batalvicigi armeojn/ de siaj vortoj?/ (Sed super tiaj vortoj/ oni devas labori jarojn/ ke ili pafu)". La malsolidaj demando kaj parentezo brile ambasadoras por rekonceptata "respubliko de l'poemoj" antaŭ la solidodezira "duklando de l'sciencoj" (esprimoj el tiu sama poemo). Poezio-studistoj malnaive saĝumus, ke similan demandan-parentezan nefinitecon priparolas *Atendado*: "Kiel la radnajlo kiu atendas veturilon/ kaj haŭto mankareson/ kaj fenestro sunsubiron briloplenan/ kaj inkujo vortojn/ mi atendas vin/ Kiel martelo ŝtonon/ vento la odoron de paperfabriko/ kiel ĉanklaketon la fusilo/ vi atendas min". Sed tia manovro estus perforte sciencisma kaj ne kondukus nin de la titola *ŝtono* al tiuj *flugiloj*, per kiuj poeto Jiří Karen kaj tradukinto Jiří Kořínek (riĉiginta la poemaron per la originala poemciklo *Arboj marŝas urben*) daŭrigas la flugon lanĉitan de Auld, Ragnarsson k.s. en la Esperanta kulturo.

Mi ne sabotu per pli da citado kaj saĝumo vian ĝuon atendi la flugilojn, kiuj sin trovas en la libro.

Probal Daŝgupto (Bharato)

Malklasika traduko de klasikaĵo

La rabeno de Bacherach, Heinrich Heine, el la germana trad. R. Hauptenthal. Düsseldorf: Heinrich-Heine-Gesellschaft, 1985. 44p. 21cm. Prezo: 5,70 gld.

En mezepoka Bacherach ĉe Rejno, la judoj celebras la paskan vesperfeston, kiam alvenas du strangaj gastoj, kiuj deziras aliĝi al la festantoj. Tro malfrue, la kongregacio rimarkas ilian sinistran intencon: La du fremduloj kaŝe enportis infanan kadavron, pri kies mortigo ili volas kulpigi la judojn.

Per tiu cetere vere okazinta sceno, Heinrich Heine komencas sian rakonton pri la rabeno de Bacherach. La protagonisto eskapas la masakron sola kun sia edzino. Persekutate de siaj malamiko, la paro vojaĝas tra tiutempa Germanio, survoje al nova, pli bona sorto. Kvankam fragmenta kaj tial iom neglektata de naciilingva publiko, la verko jam dufoje estis tradukita en Esperanton, unue de Zamenhof mem kaj nun denove de Reinhard Hauptenthal.

La fragmento de Heine fascinas pro la satira stilo, per kiu la aŭtoro vive pentras siajn karakterojn kaj ilian medion; engaĝite li pledas por pli da respekto al la moroj de la aliulo kaj akuzas maltoleremon, bigotan konduton kaj diskriminacion. De la komenco ĝis la abrupta fino, la atento de la leganto estas kaptita.

Hauptenthal invitas al komparo de ambaŭ tradukoj, supozeble ĉefe por diskutigi sian personan stilon, kiun karakterizas neologisma vorttrezoro. Laŭ lia aserto — se mi ĝuste komprenas ĝin —, lingva "modernigo" estas la ĉefa tasko de literaturo: Ĉiu lingvo ĉerpas siajn novigojn kaj precipe neologismojn el la plumo de siaj verkistoj. Ne neces tamen rimarkigi, ke verkisto neniam blinde enkondukas novajn vortojn. Ili aperos, kiam ili estas bezonataj por esprimi novajn konceptojn, kiuj ne jam esprimeblas per la ekzistanta vorttrezoro. Estas dubinde, ke tiaj konceptoj troviĝas en verko el epoko longe antaŭ tiu de Zamenhof, des pli en verko, kiun li mem tradukis. Aserti tion, signi-

fus konsideri la tradukon de Zamenhof mallerta, kvankam ties legantoj certe ne havas tiun impreson, eĉ sen kompari la tekston kun la originalo.

Kutime, neologismoj envenas lingvon tra ties plej malfermaj sferoj, t.e. plejofte kiel substantivoj. Nur iom post iom ili atingas la "kernon" de gramatiko, nome la klasojn de lokaj adverboj, prepozicioj aŭ eĉ afiksoj; tial vortoj kiel *infre* aŭ *hike*, aŭ afikso kiel *stif-* ŝajnas aparte strangaj. Verkisto, kiu volas renovigi la lingvon, devas bone koni ĝin tia, kiel ĝi estas efektive parolata, ĉar en skribita literaturo finfine surpaperiĝas nur tio, kio jam parole cirkuladis. Ĝuste tial homoj, kiuj uzas la lingvon praktike nur ĉe sia skribotablo, malofte fariĝas sukcesaj verkistoj.

La ĉefa celo de lingvouzado, eĉ de literaturo, estas komunikado. Tie troviĝas la diferenco inter la traduko de Zamenhof kaj tiu de Haupenthal. La unua celas kiel eble plej vastan internacian publikon; la esprimipova lingvaĵo de Zamenhof estas simpla, klara kaj komprenebla; dum la lingvaĵo de Haupenthal estas persona, eĉ privata. Ĝi celas malgrandan rondon de intelektuloj, disĉiploj de lia skolo.

Martin Haase (FR Germanio)

Lingve kaj kulture internacia

Baza legolibro por komencantoj, red. Vilmos Benczik. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1986. 117p. 20cm. Kun vortareto en la angla, germana, hungara, pola kaj rusa. Prezo: 13,80 gld.

Laŭ la disvastigo de Esperanto pli kaj pli multaj homoj interesiĝas pri nia lingvo kaj ĝin komencis lerni. La komencantoj soifas legolibrojn. *Baza Legolibro por Komencantoj* redaktita de Vilmos Benczik laŭ mi estas unu el la taŭgaj legolibroj por komencantoj.

Tiu ĉi libro konsistas el 36 mallongaj legaĵoj, plimulto el kiuj estas enhave interesaj, instruaj kaj facile kompreneblaj krom malmultaj kelkaj, kiuj estas ne tre taŭgaj por geknaboj, ekz. Ho, Vi Virinoj, Mal-kuraĝulo ktp. La lingvo de la libro estas klara, flua kaj laŭregula. La radikoj, per kiuj estas verkita tiu ĉi libro, estas ofte uzataj kaj multfoje ripetataj. La libro enhavas preskaŭ ĉiujn prepoziciojn, vortetojn en la tabelo de korelativoj, bazajn fraz-tipojn kaj aliajn necesajn lingvaĵojn por komencantoj. Krom tro malmultaj ne ofte uzataj afiksoj, kiaj -ism-, -um- kaj aliaj, aperas ĉiuj aktivaj afiksoj, kiuj estas ripetataj pli ol dek aŭ cent fojojn; la prefikso mal- aperas eĉ 234 fojojn. Ĉio ĉi multe helpas komencantojn en la lernado kaj eksposedo de la lingvo. Kaj la redaktoro rimarkigis la prefiksojn per streketo, kio faciligas al lernantoj la komprenadon. La librofina kvinlingva vortareto — kiel skribis la redaktoro en la antaŭparolo por kursgvidantoj — ebligas, ke komencantoj uzu tiun ĉi legolibron memstare jam post la ellerno de la plej baza gramatiko. Estus pli bone laŭ mi, se la vortareto enhavus ankaŭ francajn kaj hispanajn vortojn, ĉar tiel la uzo de la legolibro fariĝus pli internacia.

Entute, mi opinias, ke la enhavo de tiu ĉi libro taŭgas por internacia uzo kaj lingve kaj kulture. La skemo de la libro konvenas por instruisto, por memlernado, kaj lernantoj de ĉiuj aĝoj kaj edukitecoj povas uzi ĝin.

Wei Yuanshu (Ĉinio)

Laste aperis...

Anglaj prepozicioj en Esperanto, J.W. Prent. Romford: SAT-TEB, 1987 (neindikita). 20p. 21cm. Broŝ. Tradukkonsiloj. Prezo: 4,20 gld.

Almanako de bulgaraj esperantistoj, div. aŭtoroj, red. Asen Grigorov. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1984. 141p. 23cm. ISBN 963-571-128-X. Originalaj poemoj kaj noveloj. Prezo: 13,80 gld.

Aspects psycho-pédagogiques de l'espéranto, Fredo Bosmans. Lieĝo: la aŭtoro, 1987. 21p. 30cm. Pri la propedeŭtika valoro de Esperanto. Prezo: 9,00 gld.

Baranya la mistera, Csaba Székely. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1985. 36p. 20cm. Ilus. ISBN 963-571-150-6. Historio kaj folkloro de la regiono ĉirkaŭ Pécs. Prezo: 3,60 gld.

Beletro, sed ne el katedro, G. Waringhien. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1987. 258p. 21cm. Serio "Stafeto", n-ro 4. ISBN 90-71205-3. Iom reviziita dua eldono de la klasika verko *Eseoj I. - Beletro* (Stafeto, 1956). Kleraj kritikaj studoj pri la Esperanta kaj alilingva literaturo. Prezo: 34,50 gld.

Bestoj kaj homoj, Bernard Golden. Pizo: Edistudio, 1987. 135p. 21cm. ISBN 88-7036-035-5. Dek tri noveloj, el kiuj pluraj gajnis premion en literaturaj konkursoj. Prezo: 27,00 gld.

Bibliografio de la franclingvaj literaturaj tekstoj tradukitaj al Esperanto, H. Gonin. Speciala numero (383) de *Franca esperantisto*, aŭgusto 1987. 56p. 21cm. Prezo: 7,80 gld.

Blinda birdo, La (2a eld.), István Nemere (1944-). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1987. 118p. 20cm. ISBN 963-571-104-2. Romano pri lando, kie regas subpremo kaj ŝtata maljusto; gajnis la premion Libro de la Jaro 1983. Prezo: 15,00 gld.

Blua hundo, La/El Perro Azul, Guillermo Osorio. El la hispana trad. Miguel Fernández. Madrid: Aguacantos, 1987. 25p. 17cm. Broŝ. ISBN 84-398-9017-5. Dulingva eldono; noveleto. Prezo: 2,70 gld.

Ĉernobil skuis la mondon. Kompilis kaj eldonis Esperanto-Disvastiga Studgrupo, Tokio, 1987. 92p. 21cm. Ilus. Leteroj kaj artikoloj de eŭropaj esperantistoj plus fantazia dialogo inter Zamenhof kaj Einstein, reage al la atomcentrala akcidento en aprilo 1986. Prezo: 10,50 gld.

Desislava ridetas, Giorgio Silfer. Milano: Literatura Foiro, 1987. 70p. 21cm. Ilus. Lirika poemaro kaj tri prozaĵetoj, plus postkomentario. Prezo: 22,50 gld.

Doktoro Braun vivas en ni kaj Kripto, Julian Modest. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1987. 71p. 20cm. ISBN 963-571-205-7. Respektive kvarscena dramo pri persona-publika agdilemo kaj unuscena komedieto. Prezo: 12,00 gld.

Dood aan bord, De, Deck Dorval. El Esperanto trad. la aŭtoro. Antverpeno: Sonorilo, 1987. 172p. 21cm. ISBN 90-71652-14-9. Nederlandlingva versio de la krimromano *Jaĥto veturas for*. . . Prezo: 33,90 gld.

Due vite, due lingue, Fabrizio A. Pennacchietti. Vercelli: Gruppo Esperantista Vercellese, 1987. 10p. 24cm. Prelegeto de orientalist-esperantisto pri la paraleloj inter Zamenhof kaj Eliezer Ben Yehuda. Prezo: 3,00 gld.

Dulingva frazaro Esperanto-hispana. Kompilis kaj eldonis Hispana Turisma Esperanto-Sekcio, Zaragoza. 16p. 11 x 16 cm. Kun prononcokonsiloj. Prezo: 1,50 gld.

Eben-ezer. Helpa ŝtono estas limŝtono, Robert Garcet. El la franca trad. Fredo Bosmans. Lieĝo: la tradukinto, 1987. 20p. 21cm. Ilus. Pacmonumento ĉe la belga valo Geer. Prezo 12,— gld.

Eben-ezer. Historio de konstruaĵo dediĉita al paco/Esplorado pri Apokalipso, el franca originalo trad. Fredo Bosmans (neindikita). Lieĝo: la tradukinto, 1987. 11p. 30cm. Krampita. Ilus. Pri rilatoj inter belga pacmonumento kaj la biblia ĉapitro Revelacio. Prezo: 6,00 gld.

En barko senpilota, William Auld. Kun eseoj de Aldo de' Giorgi (red.), Juan Régulo Pérez, Edwin de Kock, Rejna de Jong, Marjorie Boulton, Henri Vatré. Pizo: Edistudio, 1987. 874p. 18cm. ISBN 88-7036-030-4. Kompleta poezia verkaro de argumentebla la plej granda Esperanta poeto. Prezo: 81,00 gld.

Epigramoj, Jan Izydor Sztudynger. El la pola trad. Jerzy Handzlik. Bielsko-Biala: Pola Esperanto-Asocio, 1987. 25p. 20cm. Mallongaj rimaĵoj de populara humoristo. Prezo: 3,00 gld.

Esperanto! Rik de Roover kaj Leopold Vermeiren. Malle: De Sikkell, 1987. 32p. 24cm. Ilus. Historische Verhalen nr.2. ISBN 90-260-4850-5. Nederlandlingva infanlibro pri la junaĝo de Zamenhof. Prezo: 4,50 gld.

Esperanto: l'image et la réalité, Claude Piron. Paris: CEL-CAV, 1987. 53p. 21cm. Demento de la dek plej oftaj antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto, surbaze de sistema esploro. Prezo: 9,90 gld.

Esperanto per Post. Ein Kurs in 20 kurzgefassten Lektionen, Dr. Arthur Baur. Schweizer Esperanto-Gesellschaft, 1987. 20p. 30cm. Mimeo. Mallonga ekkonduka kurso, kun germanlingvaj klarigoj, tradukekzercoj en kaj el la germana. Prezo: 8,10 gld.

Esperanto programita (7a eld. reviziita), Hermann Behrmann. El la germana nederlandigis Paul Peeraerts. Antwerpen: Vlaamse Esperanto-Bond, 1986. 349p. 21cm. Ilus. ISBN 90-71205-14-2. Aŭtodidakta metodo por uzo kun sonkasedo. Prezo: 40,80 gld.

Esperanto; Za šole in tečaje, II-a parto. (2a eld. reviziita), Rudolf Rakuša. Ljubljana: Državna Založba Slovenije, 1968. 183p. 20cm. Bind. Ilus. Progresiga lernolibro en la serbokroata. Prezo: 14,10 gld.

Esperantoterapio. Esperanto pro sana vivo, Fredo Bosmans. Lieĝo: la aŭtoro, 1986. 12p. 30cm. Krampita. Pri la psikopliboniga efiko de Esperanto. Prezo: 6,00 gld.

Flandrio, Patrick de Schepper. Wilrijk: Sonorilo, 1987. 18p. 30cm. Mapoj. ISBN 90-71652-12-2. Geografia priskribeto. Prezo: 15,00 gld.

Jenino Markso: el ŝia vivo, Erika Kopietz (lingve reviziita de Hermano Bermano k.a.). Paderborn: Esperanto-Centro Paderborn, 1987. 32p. 21cm. Ilus. ISBN 3-922570-48-8. Biografieto pri la edzino de la aŭtoro de *Kapitalo*. Prezo: 10,80 gld.

Inico al la programado. Apliko al BASIC. Rennes: Club Espéranto Rennais, 1984. 36p. 30cm. Dulingva (kun la franca). Prezo: 9,90 gld.

Juraj terminologiaj problemoj, Ivo Lapenna. Kopenhago: Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj, 1987. 38p. 25cm. ISBN 87-982430-2-0. Kun aparta konsidero pri la Esperanta terminaro, de eminenta esperantisto-juristo. Prezo: 24,00 gld.

Kanto de kantoj, el la hebrea trad. André Cherpillod. Nanterre: la tradukinto, 1987. 128p. 21cm. ISBN 2-906134-03-1. Biblia poemo tradicie atribuita al Salomono; presita paralele kun la originalo kaj amplekse komentariita. Prezo: 21,00 gld.

Kiu kiam? Interlingvistika memor-kalendaro, ĉefoslovaka parto, komp. Jaroslav Mařík. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1987. 32p. 21cm. Jubilea Eldonserio 3. Esperantologio 21. Vivodatoj de aktivuloj kaj kronologieto. Prezo: 11,40 gld.

Knedu min sinjorino! Tabuaj kaj insultaj esprimoj en Esperanto, kompilis Renato Corsetti k.a. Pierrefitte: La Kancerkliniko, 1987 (neindikita). 23p. 30cm. ISSN 0398-5822. Glosaro de vortoj efektive uzitaj-uzataj. Prezo: 7,50 gld.

Komedio de eraroj, La, W. Shakespeare. El la angla trad. William Auld kaj Asen M. Simeonov. Glasgow-Sarajevo: Eldonejoj Kardo-ELBiH, 1987. 88p. 21cm. ISBN 0-905149-25-4. Frua ŝekspira komedio, pri duobla identec-konfuzo. Prezo: 15,60 gld.

Kumeuaua djungelns son, Tibor Sekelj. El Esperanto trad. Leif Nordenstorm. Boden: Nordenstorms Förlag, 1987. 68p. 21cm. ISBN 91-971004-0-4. Sveda eldono de la fama infanlibro. Prezo: 12,00 gld.

Lasta virino, La, Manuel Cofino. El la hispana trad. Arnoldo Aguila. Havano: José Martí, 1986. 188p. 21cm. Premiita kuba romano pri amo kaj lukto kadre de la revolucio. Prezo: 9,00 gld.

Leteroj el mia muelejo, La (1) (1868), Alphonse Daudet (1848-1897). El la franca trad. Camille Boumal. Speciala numero (384) de *Franca esperantisto*, sept. 1987. 52p. 21cm. ISSN 0775-7698. Viglaj rakontoj pri kamparana vivo, de franca majstro de tiu ĝenro. Prezo: 7,80 gld.


Lisao, La, Qu Yuan (ĉ. 342-ĉ.282 a.K.). El la ĉina trad. Licius. Sendai (Japanio): Sendai Esperanto-Asocio, 1987. 48p. 19cm. Ĉefverko de la unua granda ĉina poeto, kun paralela ĉina teksto, utilaj notoj kaj postparolo. Prezo: 6,00 gld.

Loĝeja cirkonstanco tra la mondo, kompilis kaj eldonis Meguro-Esperanto-Societo (Tokio), 1987. 46p. 30cm. Ilus. Rezultoj de internacia enketo el 1984; dulingva eldono. Prezo: 7,20 gld.

Majstro kaj Margareta, La, Kris Long surbaze de la ruslingva verko de Miĥajl Bulgakov. Pierrefitte: La Kromkancerkliniko, 1987. 34p. 30cm. ISSN 0398-5822. Kvinjamba senrima resumo. Prezo: 7,50 gld.

Plena ilustrita vortaro de Esperanto kun suplemento, ĉefred. G. Waringhien (1901-). Paris: SAT, 1987 (4a eld, pliampleksigita). 1392p. 20cm. Bind. Ilus. E. Stöp-Bowitz. Normiga verko, la plej ampleksa vortaro de la Internacia Lingvo; kun nova 45-paĝa Suplemento. Prezo: 138,00 gld.

Plena ilustrita vortaro de Esperanto. Suplemento, R. Levreau kaj G. Waringhien. Paris: SAT, 1987. 45p. 20cm. Grava aldono al PIV, enhavanta precipe (sed ne nur) teknikajn vortojn. Prezo: 12,90 gld.



Japanaj sukcesoj: Originala uzo de Esperanto (m.d.) kaj historio ĉe prestiĝa eldonejo.

Halka (1847), S. Moniuszko/W. Wolski. EL la pola trad. Antoni Grabowski (1857-1921). Kun enkonduko de Andrzej Pettyn. Varsovio: Pola Esperanto-Asocio, 1987. 16 + 38p. 20cm. Represo de la unua opertraduko en Esperanto, honore al la Jaro de Grabowski 1988. Prezo: 6,00 gld.

Historio de Bretonio, Christian Bertin. Cesson-Sévigné: la aŭtoro, 1987. 38p. 21cm. Mapoj. Precipe politika skizo. Prezo: 5,40 gld.

Historio de la kontraŭregima Esperanto-movado (japanlingva; 2a eld. reviziita), Y. Oosima kaj M. Miyamoto. Sanseido-Tokio, 1987. 390p. 19cm. Ilus. ISBN 4-385-35310-7. Reeldono de klasika studo el 1974; inter la plej detalaj nacimovadaj historioj. Prezo: 50,10 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezaj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 20% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezaj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Oficiala Informilo

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Aŭstralio: S-ino T.M. Metherall. Japanio: Alfred Petrov.

SOCIETO ZAMENHOF 1987

Brazilo: Luiz Mario Santos da Silva. FR Germanio: Elisabeth Hirsch; Richard Hirsch. Svedio: Birger Viggen; Inga-Maj Lindkvist. En 1987: 197.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

PATRONOJ (minimumo \$100): Kanarioj: Larĝa Adomski. AMIKOJ (minimumo \$10): FR Germanio: Joachim Giessner. Irlando: Christopher Fettes. Usono: Scott S. Smith.

PATRONOJ DE TEJO 1987

Hispanio: Enric Gimeno Palau. Italio: Vittoria Spina. Nederlando: H. ten Hagen; Jenny Heetkamp-Sensius; W.L. van Leeuwen. Usono: Bernice Garrett. En 1987: 60.

DONACOJ 1987 (gld.)

ĝis la 31a de decembro

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Aŭstralio: T.M. Metherall 63,80. Japanio: A. Petrov 12,69. Kanado: S. Norvell 14,69; P. Collinge 23,50; Agnes Nii 14,38. Nederlando: O. Hoekstra 416,00; S.A.K. v.d.Zee 100,00; E.M. Maasbommel 100,00; E.J. Woessink 500,00; C. Duivenvoorde 150,00; J.C. v. Veenendaal 50,00. Sumo en 1987 11 273,67.

FONDAĴO CANUTO: FR Germanio: B. Vogelmann 40,00. Kanado: S. Norvell 14,69; P. Collinge 29,38; P. Larose 71,90; A. More 14,38. Nederlando: R. Slot 200,00; S.A.K. v.d. Zee 50,00; E.M. Maasbommel 50,00; E.J. Woessink 2500,00; J.C. v. Veenendaal 50,00. Diversaj malgrandaj 18,16. Sumo en 1987 6308,17.

FONDAĴO ENCIKLOPEDIO: Sumo en 1987 29,74.

FONDAĴO ANTONI GRABOWSKI (en usonaj dolaroj): Sumo en 1987 550,53.

ĜENERALA KASO: Britio: E. Fowden 16,85; M.E. Jelfs 16,80. Danlando: E. Bak 50,00. Francio: L. Goudé 24,25. FR Germanio: W. Kahlert 29,05; H. Bily 56,20; M. Gründler 33,72. Jugoslavio: Pretnar Emeric 31,45. Nederlando: S.A.K.v.d.Zee 150,00; O. Hoekstra 500,00; G.F. Makkink 1000,00. Svedio: Karla Olsson 621,20. Diversaj malgrandaj 26,09. Sumo en 1987 12 394,42.

FONDAĴO OFICEJA ILARO: Nederlando: A.W. Treurniet 27,50. Sumo en 1987 2805,12.

ASOCIA KAPITALO: Hispanio: P. Gonzalez Cantero 4315,00. Sumo en 1987 9512,78.

JUBILEA JARO: Sumo en 1987 6906,62.

PROPAGANDA KOSTO: Aŭstralio: T.M. Metherall 63,80. Diversaj malgrandaj 3,82. Sumo en 1987 251,72

FONDAĴO SCIENCO KAJ TEKNIKO: Danlando: E. Bak 50,00. Sumo en 1987 2408,65.

FONDAĴO WUSTER: Anonime 561,70. Anonime 561,85. Sumo en 1987 9526,98.

Nekrologoj

NORBERT BARTHELMESS (1897-1987), la lasta el la pioniraj figuroj en Sennacieca Asocio Tutmonda, forpasis la 30-an de novembro en Parizo. Lerninte Esperanton jam antaŭ la unua mondmilito, li aliĝis al SAT tuj post ĝia fondo kaj redaktis *Sennaciulo* dum 1924-25, 1928-39 kaj 1948-82. Nur Lanti faris al la Asocio pli gravan idean kaj praktikan kontribuon.

ANTUN-TONČI JORGOVANIĆ, iama delegito de UEA, kunorganizinto de la 38a UK en Zagrebo kaj multjara aktivulo de la fama zagreba klubo "Bude Borjan", estis enterigita la 29an de oktobro 1987 en la ĉeesto de anoj de la societo.

Prof. SEIITI KATŌ (1910-1987), delegito kaj fakdelegito pri medicino en Matumoto, Japanio, forpasis la 5an de decembro. Li estis rektoro kaj honora profesoro de Universitato Sinsyū. Inter liaj Esperantaj verkoj elstaras la fama *Manlibro pri oftalmologio* (1959, 2a eld. 1963).

LINDA KÖST (1933-1987), fakdelegito en Tallinn, Sovetunio, mortis tie fine de la pasinta jaro.

AARON KROLENBAUM (1909-1987) mortis en Londono la 4an de oktobro. Profesie teologo, li ofte gvidis diservojn en Esperanto kaj estis fama pro sia jida traduko de la Nova Testamento.

FONDAĴO TEJO: Danlando: E. Bak 50,00. Nederlando: E.M. Maasbommel 100,00. Sumo en 1987 2415,98.

FONDAĴO AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: Danlando: E. Bak 50,00. Sumo en 1987 3600,78.

ĈINIO: Sumo en 1987 936,45.

TRIA MONDO: Heroldo: 90,00. Nederlando: O. Hoekstra 500,00. Sumo en 1987 1229,45.

ESPERANTO CENTRO BIALYSTOK: Svedio: C.J. Eberstein 150,00. Sumo en 1987 206,27.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

KEINOSUKE MURATA (1910-1987), unu el la aŭtoroj en *Esperanta antologio*, mortis la 20an de septembro en Toyonaka.

FERENC NEZVAL (1909-1987) prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio de 1977 ĝis 1986, mortis la 26an de novembro en Budapeŝto. Li i.a. oficis dek jarojn kiel la hungara Ministro pri Justico.

KOITIRO OZAWA (1907-1987), delegito en Gihu, Japanio, forpasis la 18an de novembro.

FREDERIC SPINDLER, dumviva membro de UEA, mortis antaŭnelonge en Cannes, Francio.

CHRISTINE SPRUCH forpasis la 22an de aprilo 1987 en Brühl, FR Germanio. Ŝi estis dumviva membro de UEA kaj ofta mecenato de la Novjorka Oficejo.

OTTO WALDER (1911-1988), multjara ĉefdelegito de UEA (1946-1967) kaj unu el la plej elstaraj movadaj aktivuloj en Svislando dum pli ol 50 jaroj, forpasis en Romanshorn la 11an de januaro. Eĉ kiam li formetis siajn ĉefdelegitajn taskojn, Walder daŭrigis servi al UEA kiel peranto de periodaĵoj kaj libromendoj. Li estis dum jardekoj loka delegito kaj fakdelegito kaj plenumis diversajn funkciojn en la svisa movado.

Marjorie Boulton

FAKTOJ kaj FANTAZIOJ

La nun jama fama legolibro por progresantoj, speciale komisiita de UEA, kun 52 variaj ĉapitroj, plenaj de fabeloj, mirindaĵoj kaj rakontoj pri homaj atingoj kaj kuriozaĵoj el la tuta mondo.

"Ĉi tiu riĉ-enhava kaj lingve bonega libro estas skribita en stilo, kiun oni sen pli povas nomi modela. Kvankam la aŭtorino klopodas por ke la libro estu gradigita de tre facila al malpli simpla, ni nenie trovas stilon infanan, nematuran kaj tedan, kiel ofte en lerniloj. Ĉi tie ni renkontas Esperanton en ĝia pura formo, klara senartifika kaj ofte tre originala."

H.A. de Hoog (*Dia regno*, n-ro 1/1985)

Eldonis Universala Esperanto-Asocio, 1984. 432p. Ilustrita de Alex Brychta. 21cm. ISBN 92 9017 028 X. Mendu ĉe la Libroservo de UEA. Prezo: 36,00 gld. (plus sendokostoj; rabato de unu triono por minimume tri ekzempleroj).

KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

CH-2301 LA CHAUX-DE-FONDS (Svislando)

atendas vin la tutan jaron. Agrabla esperanto-vivo, bonaj manĝoj, komfortaj ĉambroj, sana vivo en la montaro.

La venontaj esperanto-staĝoj por komencantoj kaj progresantoj okazos la ĉi-sekvajn semajnojn: 15-20 kaj 22-27 februaro 1988, 21-26 marto, 18-23 aprilo, 23-28 majo, 20-25 junio, ktp.

Aliaj aranĝoj: 4-9 aprilo: Intensiva pretiĝo al trapaso de esperanto-ekzamenoj. 4-9 aprilo: Ĉu eblas societo sen leĝoj? Seminario pri homaranismoj esploroj. Instruos François Degoul. 21-23 majo (pentekosto) 2-a studa semajnfino pri arbaro (en arbaro kun arbaristo). Instruos Johann Pachter. 23-28 majo: 4-a seminario pri la nomoj de sovaĝaj plantoj. 27-28 majo: Biblio studo. 28-29 majo: Seminario pri nova biologia nomenklatur. Prezidos Wim De Smet. 30 majo — 3 junio: Ornitologia semajno. Instruos Wim De Smet. **Petu la detalan informilon.**

La vualo de l' tempo


de J.H. Sullivan (1913)

Dudek originalaj noveloj, en kiuj "rolas la propra stilo de Sullivan, kiu sukcesis esprimi sin per ekvilibre riĉa, klara kaj flua lingvaĵo,... sed la plej trompa trajto estas la fino de ĉiu novelo...: vi neniam trovos..."

Georgo Camacho


Eld. TK/Stafeto, 1985. 116p. 22cm. ISBN 90 6336 028 2. Prezo: 19,50 gld. Rabato de unu triono por samtempa aĉeto de minimume tri ekzempleroj, plus sendokostoj. Mendu de la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

TRI ESPERANTO-LIBROJ EL KUBO



La historio absolvos min, Fidel Castro. José Martí, 1984. 62p. Prezo: 6,00 gld.

En 1953, kortumo en Havano kondamnis Fidel Castro je 15 jaroj de mallibero pro revolucia agado. Mem juristo, Castro defendis sin per ĉi tiu fajra parolado, kiu fariĝis kvazaŭ programo de la kuba revolucio, venkonta 6 jarojn poste.



Kuba ŝtata organizo, Domingo García Cárdenas. José Martí, 1985. 146p. 7,50 gld.

Jen densa, detala priskribo de la transformo de Kubo en socialisman ŝtaton post la revolucio en 1959. La libro prezentas la faktojn "sincere sen belaj vortoj por amikiĝi ĉie ajn" (Werner Bormann, *Esperanto* 1987/p.201).



La lasta virino, Manuel Cofino. El la hispana trad. Arnoldo Aguila Miguel. José Martí, 1986. 188p. Prezo: 9,00 gld.

Temas pri unu el la plej famaj romanoj el Kubo, kiu jam aperis en 29 eldonoj en 17 landoj. En 1971 ĝi gajnis la Premion Domo de Amerikoj. Per noveca strukturo kaj poezia vortpentrado, la romano tre vigle rakontas pri amo kaj konflikto kadre de la konstruado de nova sociordo.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA. Aldonu 10% por sendokostoj. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

**Piaf kantas
en Esperanto!**

Si furoris en Pekino kaj ravis en Varsovio. Nun vi povas ĝui la artismon de Joëlle Rabu sur 60-minuta sondisko aŭ kasedo. "Passport" inkluzivas kantojn en la angla, franca kaj Esperanto, kun plenaj tekstoj.

*Passport
Joëlle Rabu*

Ankoraŭ haveblas (6"-disko):

Omaĝo al Veselin Damjanov

Mendu de la Libroservo de UEA. Passport (kasedo aŭ disko): 31,20 gld.; Omaĝo: 6,00 gld. 1/6-a rabato por minimume 3 ekz.

el la seminario organizita de UEA ĉe Unesko (1985):

**PLURILINGUISME
ET COMMUNICATION**

red. F. Lo Jacomo

Studadon de komunikado oni ne limigu al studado de teknologiaj iloj por diskonigi informojn: jen la ĉeftemo de la 24 aŭtoroj de ĉi tiu verko. kies tekstoj prilumas unuflanke la riĉan kontribuon de lingva diverseco al la homa heredaĵo, aliflanke la gravecon kaj aktualecon de la tiufontaj komunikaj problemoj. 80% franclingva, 20% anglalingva.

Plurlinguisme et communication, red. F. Lo Jacomo. Paris: SELAF, 1986. 330p. 24cm. ISBN 2 85297 194 1. Prezo: 57,00 gld.

**Bjalistoka Jubilea Medalo
el bronzo * 10,5 cm * 341 gr.**



Unuflanke, reliefa portreto de Zamenhof; aliflanke, Jubilea desegnaĵo kaj teksto.

Mendu de la Libroservo de UEA (36,00 gld. plus sendokostoj — minimume 5 gld., alikaze 10%; 1/6-a rabato por tri aŭ pli da ekz.).

KOREAJ ESEOJ

NOVELOJ KAJ POPOLRAKONTOJ

1932-1967

TRADUKIS HAJPIN LI

222p. 15x22cm. *Mendu ĉe la Libroservo de UEA:* 12,90 gld. plus sendokostoj.

UEA serĉas organizanton-administranton por siaj Universalaj Kongresoj.

**Konstanta
Kongresa Sekretario**

Funkcioj: Inkluzivas buĝetadon kaj librotenadon, redaktadon de kongresaj eldonaĵoj, laborkunordigadon kaj korespondadon. KKS kunlaboras kun Loka Kongresa Komitato kaj respondecas pri kongresa politiko al la Estraro de UEA.

Kvalifikoj: Studoj pri ekonomiko, sociologio aŭ manĝeraj sciencoj estas bonvenaj. Necesas flua, bonnivela rego de Esperanto; kono de aliaj lingvoj estas tre dezirinda. Kandidato devas posedi kelkjaran sperton kiel aktiva esperantisto, organizan kaj mastruman talenton, kapablon kunordigi grupan laboron, agrablan kaj firman karakteron, facilon kontakti homojn kaj harmonie kunlabori kun ili, entuziasmon kaj iniciatemon. La posteno aparte taŭgas por persono inter 25 kaj 35 jaroj, prefere ne edz(in)iĝinta.

Sendu kandidatiĝojn aŭ eventualajn informpetojn al la Centra Oficejo en Roterdamo, Nederlando.

**ĈU LA HOMARO TRAVIVOS
LA NUKLEAN EPOKON?**

Legu **LA RESPONDON DE DIO**. Petu la senpagan libreton de Internacia Biblia Misio, 29 Plantation Road, Poole BH17 7LN, Britio.

**STUDOJ PRI LA INTERNACIA LINGVO
Etudes sur la langue internationale
Studies on international Language**

Michel Duc Goninaz (ed.)

Université de Provence à
Aix-en-Provence
En collaboration avec
la Universala Esperanto-Asocio

J. Leyk, La Esperanta socio fronte al la ekstera medio; U. Lins, Marxismus und internationale Sprache; D.L. Gold, N.Z. Maimon's La kaŝita vivo de Zamenhof; R.E. Wood, The Development of Standard Phonology in Esperanto; P. Janton, Latentaj strukturaj trajtoj de la Esperanta gramatiko; R. Rokicki, Leksemstrukturaj aspektoj klasifiki la Esperantan morfemaron; I. Szerdahelyi, Principoj de Esperanta etimologio; M. Duc Goninaz, Problemes sémantiques et sociolinguistiques dans l'usage de l'espéranto; C. Piron, Créativité et expression linguistique.

Gent
AIMAV
1987

Mendu de la Libroservo de UEA: 39,00 gld. plus sendokostoj, 1/3-rabato por minimume 3 ekz.